# der esperantist

**Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR**

20. Jahrgang | Nr. 124 (2/1984) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf


## 35 jaroj GDR – 35 jaroj porpaca politiko

Milito aŭ paco? Jen la baza demando de la aktuala internacia situacio. Nenio evitigas tiun demandon — neniu povas ĝin ignori. Respondante tiun demandon la mondoj dividiĝas: Sur unu flanko, sur nia flanko, estas la devontiga eldiraĵo, ke ne ekzistas io pli grava ol la paco, ties konservado kaj firmigado. Tio ne nur estas iu eldiro, sed programo — jam 35 jarojn, ekde la ekzisto de nia ŝtato, kaj tio estas la primara kaj plej grava bazo de la akordigita ekstera politiko de la socialisma ŝtatara komunumo. Sur la alia flanko, ĉe NATO, aparte flanke de la USONA registaro, ni konas la danĝeran eldiraĵon, ke „ekzistas pli gravaj aferoj, ol esti en paco" —.

Ĉu la instruoj el du mondmilitoj jam estas forgesitaj — aŭ la konkludoj entute tiritaj? Tiu ĉi demando sin altrudas. Ni tiris la konkludojn, profunde, tio signifas konsekvence. Ni ŝanĝis la sociajn rilatojn gvidantajn al la milito en la fundamento ekde la bazo.

Konservado de la paco — tio estis ekde la komenco la unua vivomaksimo de la civitanoj de nia laborista kaj kamparana ŝtato kaj, sekve, la ĉefa laŭkonstitucia devo. Ekde la komenco estis kongruo inter la pacvolo de la civitanoj kaj la politika agado de la ŝtato. Ĉi-tie oni elradikigis la sociekonomiajn kaŭzojn kaj bazojn por la militpolitiko kaj milito, surbaze de la decidoj de la Konvencio de Potsdam. Ĉi-tie ne ekzistas klaso aŭ tavolo de homoj profitantaj je la armado, interesiĝantoj je militperparado aŭ miilto. Ĉi-tie disvolviĝis potenca movado kontraŭ la remilitarigo de FRG, por la proskribo de nukleaj armiloj, kontraŭ la lokigo de novaj usonaj mezdistancaj raketoj en Okcidenta Eŭropo. Nia paca ŝtato eliris plifortigita el la multaj luktoj kontraŭ la fortoj de potenco kaj militò. Ni triumfis super tiuj, kiuj asertis, ke nia ŝtato eĉ ne ĝisvivos la finon de la jaro 1949.

Hodiaŭ, dum sia 35a ekzistado, la Germana Demokratia Respubliko sin pruvis kiel fidinda bastiono de paco en la koro de Eŭropo, kiel tion deklaris dum oktobro de 1949 la unua prezidanto de nia ŝtato, Wilhelm Pieck.

(El „Informationen" de Packonsilantaro de GDR, 5/1984)

## Komuniko

La 17a Konsultiĝo de SLEOj okazis en Bad Saarow (GDR) de la 26a ĝis 31a de marto 1984. Estis reprezentitaj Esperanto-asocioj de Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio.
Ili pritraktis la problemojn de sia kunlaboro en la nuntempa komplika politika situacio, de la apliko de Esperanto en sia aktiveco por la paco kaj diversajn espektojn de la Esperanto-movado en la unuopaj landoj.
La partoprenintoj aprobis la Deklaron, kiu estos publikigita aparte.
SLEOj speciale dankas la Esperanto-Asocion en Kulturligo de GDR por la bonegoj laborkondiĉoj, kiujn ĝi certigis kiel gastiganto.
Bad Saarow, la 30an de marto 1984

## Deklaro

La reprezentantoj de Esperanto-asocioj el socialismaj landoj (Bulgario, ĈSSR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio), partoprenintaj la 17an Konsultiĝon la 26an — 31an de marto 1984 en Bad Saarow, pritraktis diversajn aspektojn de sia kunlaboro en la nuntempa internacia politika situacio, priakriĝinta pro la instalado de novaj usonaj raketoj en Eŭropo, esprimis sian plenan subtenon al la proponoj de la socialismaj landoj pri malarmado kaj paca kunekzistado. Ili substrekas la grandan signifon de la malstreĉiĝo por la interŝanĝo de kulturaj valoroj inter ĉiuj nacioj.
La partoprenintoj alvokas la esperatistaron pliintensigi la ĝisnunajn aktivecojn por paco kaj interkompreniĝo kun la celo sekurigi tiel ankaŭ la bazajn kondiĉojn por la sukcesa evoluo de la Esperanto-movado.
Bad Saarow, la 30a de marto 1984

## Amikeckontrakto kun ASE

Kiel oni povas ekscii el la Komuniko, la 17-a konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj okazis ĉijare en Bad Saarow. Kiel kutime en konstruiva kaj amika atmosfero la partoprenintaj kolegoj traktis abundan tagordon pri problemoj de la komuna agado. La bonegaj kondiĉoj, en esperantistaj rondoj internacie jam konataj de la ripozejo kaj seminariejo de Kulturligo helpis la bonan iron de la aranĝo. Kvankam ne kiel programpunkto de la Konsultiĝo, ĉar nur post ties oficiala fermo, tamen tre grava evento estis la subskribo de Kontrakto pri amikeco kaj kunlaboro inter la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj kaj Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR. GDREA estis tre feliĉa, ke ĝuste dum tiuj tagoj en Bad Saarow alvenis la solena momento por fari tiun gravan paŝon. Ni publikigas la tekston en Esperanto kaj la germanan version en ĉi tiu numero. La Kontrakto reflektas akiritan nivelon de la rilatoj inter ambaŭ asocioj kaj samtempe malfermos novan etapon de la kunlaboro. Ja tre konataj estas la tradiciaj ligoj inter la germanaj laboristaj esperantistoj de la 20-aj kaj 30-aj jaroj al sovetuniaj esperantistoj. Pri tiuj ligoj ni jam publikigis multajn materialojn. En la spirito de tiuj tradicioj la iama Centar Laborrondo kaj hodiaŭa Esperanto-Asocio en GDR daŭrigis la multflankan kunlaboron kun sovetiaj esperantistoj. Ankaŭ pri tio oni povis multon legi en nia organo. GDREA estas certa, ke la kontrakto konsiderinde stimulos la kunlaboron inter ambaŭ asocioj kaj ĝin plue konkretigos sur ĉiuj ebenoj.

# KONTRAKTO

## pri amikeco kaj kunlaboro inter Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR kaj Asocio de Sovetiaj Esperantistoj

Gvidata de la deziro kontribui al la plifirmigo de la amikeco inter Germana Demokratia Respubliko kaj Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj por plifortigo de la pozicioj de socialismo kaj por la batalo je paco kaj malarmado,
en la spirito de la tradicioj de kunlaboro inter la revoluciaj germanaj laboristaj-esperantistoj kaj sovetiaj esperantistoj
kaj kongrue kun la laborplano inter la Registaroj de GDR kaj de USSR pri kultura kaj scienca kunlaboro dum la jaroj 1981 — 1985,
Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR kaj Asocio de Sovetiaj Esperantistoj interkonsetas pri jena Kontrakto:

§ 1

La Kontraktantaj Partneroj taksas kiel ĉefparton de sia kunlaboro aparte la interŝanĝon de informoj kaj spertoj.
Tio precipe koncernas:
— la specifan kontribuon de la esperantistoj ĉe la plua konstruado de disvolvigita socialisma socio en ambaŭ landoj kaj la utiligon de la internacia lingvo por la eksterlanda informado pri tio,
— la plialtigon de la politika-ideologia, faka kaj lingva nivelo de la membroj,
— la sciencajn aspektojn de Esperanto (interlingvistiko/esperantologio),
— problemojn de la esploro de la historio de la germana-sovetia amikeco en la laborista Esperanto-movado.

§ 2

La Kontraktantaj Partneroj akcelas kaj subtenas, laŭ la eblecoj:
— la evoluigon de individuaj kaj kolektivaj korespondadoj,
— la interŝanĝon de publicaĵoj,
— la okazigon de aranĝoj kaj aliaj aktivecoj servantaj al la pli bona reciproka informado pri la atingitaj

# VERTRAG

## über Freundschaft und Zusammenarbeit zwischen dem Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR und dem Verband Sowjetischer Esperantisten

Geleitet von dem Wunsch, einen Beitrag zur Festigung der Freundschaft zwischen der Deutschen Demokratischen Republik und der Sowjetunion zur Stärkung der Positionen des Sozialismus und für den Kampf um Frieden und Abrüstung zu leisten,
im Geiste der Traditionen der Zusammenarbeit zwischen revolutionären deutschen Arbeiter-Esperantisten und sowjetischen Esperantisten und in Übereinstimmung mit dem Arbeitsplan zwischen der Regierung der DDR und der Regierung der UdSSR über kulturelle und wissenschaftliche Zusammenarbeit in den Jahren 1981 — 1985 schließen der Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR und der Verband Sowjetischer Esperantisten diesen Vertrag.

§ 1

Die Vertragspartner messen dem Informations- und Erfahrungsaustausch als Kernstück ihrer Zusammenarbeit besondere Bedeutung bei.
Dabei stehen im Mittelpunkt:
— der spezifische Beitrag der Esperantisten zum weiteren Aufbau der entwickelten sozialistischen Gesellschaft in beiden Ländern sowie die Nutzung der internationalen Sprache für die Auslandsinformation,
— die Erhöhung des politisch-ideologischen, fachlichen und sprachlichen Niveaus der Mitglieder,
— wissenschaftliche Aspekte des Esperanto (Interlinguistik / Esperantologie),
— Probleme der Erforschung der deutsch-sowjetischen Freundschaft in der Arbeiter-Esperanto-Bewegung.

§ 2

Die Vertragspartner fördern und unterstützen, entsprechend ihren Möglichkeiten:
— die Entwicklung der individuellen

rezultoj ĉe la konstruado de disvolviĝinta socialismo,
— la evoluigon de rilatoj inter la junuloj de siaj asocioj,
— la partoprenon de siaj membroj en naciaj kaj internaciaj Esperanto-aranĝoj en iliaj respektivaj landoj.

§ 3

La Kontraktantaj Partneroj interkonsentas, pliprofundigi sian kunlaboron en internaciaj Esperanto-organizajoj kaj dum kongresoj kaj aliaj aranĝoj.

§ 4

Tiu ĉi Kontrakto donas la kadron por la plua evoluigo de la kunlaboro inter la Kontraktantaj Partneroj kaj akcelas la rektan kunlaboron de iliaj diversaj gvidebenoj.
La Kontraktantaj Partneroj organizas ĉiun duan jaron, alterne en siaj landoj, kunsidon por pritaksi la aktualan staton de la realigo de la Kontrakto kaj por interkonsenti pri komunaj farendaĵoj. Tiun kunsidon partoprenas de la sendanta flanko po 2 reprezentantoj.

§ 5

La Kontrakto estas tempe nelimigita. Ĝi povas esti ŝanĝata aŭ kompletigata laŭ la deziro de unu el la Kontraktantoj. Ĝi validos ekde la subskriba dato. La reoligokondiĉoj de la Kontrakto sekvas la ĝeneralajn preskribojn fiksitajn en la koncerne valida kultura laborplano de GDR kaj USSR kaj la donitaj eblecoj de la Kontrakto-partneroj.

§ 7

Pretigita kaj subskribita la 30. 3. 1984 en Bad Saarow en la germana, rusa kaj en Esperanto. La tiulingvaj tekstoj estas same validaj.

Por
Esperanto-Asocio en Kulturligo
de GDR

H. Heinel — Prezidanto
D. Blanke — Sekretario

Por
Asocio de Sovetiaj Esperantistoj

M. I. Isaev — Prezidanto
N. Zubkov — Vicprezidanto

und kollektiven Korrespondenzen,
— den Austausch von Publikationen,
— die Durchführung von Veranstaltungen und anderen Aktivitäten, die der besseren gegenseitigen Information über die erreichten Resultate beim Aufbau des entwickelten Sozialismus dienen,
— die Entwicklung der Beziehungen zwischen den Jugendlichen ihrer Verbände,
— die Teilnahme ihrer Mitglieder an nationalen und internationalen Esperanto-Veranstaltungen in ihren Ländern.

§ 3

Die Vertragspartner kommen überein, ihre Zusammenarbeit in internationalen Esperanto-Organisationen sowie auf Kongressen und anderen Veranstaltungen zu vertiefen.

§ 4

Dieser Vertrag bildet den Rahmen für die weitere Entwicklung der Zusammenarbeit der Vertragspartner und fördert die direkte Zusammenarbeit ihrer verschiedenen Leitungsebenen. Die Vertragspartner führen alle zwei Jahre abwechselnd in ihren Ländern eine Beratung durch, um den aktuellen Stand der Realisierung des Vertrages einzuschätzen und sich über gemeinsam zu lösende Aufgaben zu einigen. Daran nehmen von der entsendenden Seite jeweils zwei Repräsentanten teil.

§ 5

Der Vertrag ist zeitlich unbefristet. Er kann geändert oder ergänzt werden, wenn einer der Vertragspartner das wünscht. Er tritt am Tage der Unterzeichnung in Kraft.

§ 6

Die Modalitäten der Realisierung des Vertrages richten sich nach den allgemeinen Bestimmungen, wie sie im jeweils gültigen Kulturarbeitsplan fixiert sind und nach den gegebenen Möglichkeiten der Vertragspartner.

§ 7

Ausgefertigt und unterzeichnet am 30. 3. 1984 in Bad Saarow jeweils in Deutsch, Russisch und Esperanto, wobei die Texte gleichermaßen gültig sind.

**D-ro Erich-Dieter KRAUSE, Leipzig:**

# Repliko al s-ro Reinhard Haupenthal*

En DIALOGO (1/1984), organo de Sarlanda Esperanto-Ligo, aperis recenzo pri la Vortaro Germana-Esperanta[1]) aperinta pasintjare en Leipzig, GDR. La recenzinto, s-ro Haupenthal, dediĉas 64 liniojn al la prijuĝo de ĉi tiu leksikografia verko. Okulfrapa estas la fakto, ke li plenigas entute 46 liniojn por paroli pri preseraroj, pluraj mankoj en la vortaro kaj pri [diversaj] pekoj kaj kulpoj de la aŭtoro. Sole 18 liniojn li trovas adekvataj por fari ĝeneralajn rimarkojn, kiuj iel rilatas al la koncerna verko. Titollinie s-ro Haupenthal almenaŭ agnoskas, ke la jus aperinta vortaro ‚superas la ĝisnunajn'.

Ne estas mirige, ke la recenzisto tiuproporcie kutimas sin esprimi, ĉar jam en la jaro 1968, kiam aperis la unua poŝvortaro pri Esperanto[2]) en GDR, estis ĝuste tiu s-ro Haupenthal, kiu ankaŭ tiutempe elstaris per sia recenzo kiel la sola recenzinto[3]) al kiu la plejmulto ne plaĉis.

Mi siatempe ne reagis, sed nun, post tralego de liaj asertoj en Dialogo pri mia nova, pli granda vortaro, mi jam ne plu povas silenti.

**Ĝenerala rimarko:**

S-ro Haupenthal foje pripensu, kial, kaj en 1968 kaj nuntempe, senescepte ĉiuj aliaj ĝisnunaj recenzintoj pri la Esperanto-vortaroj, verkitaj de mi, prijuĝas ilin pozitive.

Se Hans WINGEN kaj Alfonsz PECHAN, mem konataj leksikologoj, tiom ege kontrastas al via opinio en siaj recenzoj[4]), tiutempe en 1968, kaj se la ĝisdata eĥo je la nove aperinta vortaro estas, kvazaŭ unuvoĉe, fundamente diferenca de via pritakso, tiam oni povas nur konjekti, ke la kialo por tio nepre devas kuŝi en ia trotakso de viaj propaj kapabloj sur la kampo de leksikologio. Kaj unu afero estas klara: Leksikografio estas afero tute alia ol verkado de artikolo en Esperanto aŭ de monografio pri Esperanto, eĉ se verkinto kredas pri si mem esti sperta leksikologo!

**Specifaj rimarkoj:**

Pri preseraroj: Ili fakte ege maloftas en la vortaro. Vi menciis du el ili, ambaŭ jam estis sur mia listo de korektendaĵoj por la dua eldono. Kaj vidu: en via recenzo, nur sesdekkvarlinia, sole troviĝis kvar preseraroj! Kiel facile do agas la preskoboldo.

Pri neologismoj: Mi persone ne unusolan neologismon enkondukis. La menciitaj de vi **minjona** (sub: niedlich) [de la franca „mignon"] kaj **denonci** (sub: kündigen [Abkommen, Vertrag]) [france „dénoncer", itale „denunziare"] estas jam registritaj en leksikografiaj verkoj de Esperanto, la unua ĉe Bennemann (vortaro G-Esp, paĝo 266) kaj Wingen (vortaro G-Esp, pĝ. 103) — ambaŭ verkojn vi aliloke citas por mi kiel modelajn koncerne la leksikologian aparaton — kaj la dua en la slipara vortaro de R. Eichholz.

Mi havas, cetere, alian opinion ol vi kiam temas pri la nepreco de aldono de t. n. leksikologia aparato en vortaro du-lingva. Laŭ mi io tia estas dezirinda en normiga **unu**lingva vortaro kiel PIV, Parnasa Gvidlibro k. s.

Vortaroj, kiuj unuacele servas al praktikaj celoj, havas plene diferencan taskon kaj ne estas faritaj por subtilumi en eksperta rondo. Ne ĝusta estas via opinio, ke simpla inversigo de la vortostoko de PIV estas la panaceo. Mezgranda vortaro kiel la mia simple ne povas prezenti la PIV-an amplekson.
Sed, prefere, mi traktu viajn atakpunktojn: Vi kulpigas min pri mistra-

dukoj, ekz. vi skribas „... laŭ Krause ‚Preßlufthammer' estas **pneŭmatika martelo.** La PIV-an ‚kompresoro' li ne indikas." Estas vi, kiu eraras, ne mi! Mi ripetas: la ekzakta Esperanto-ekvivalento de „Preßlufthammer" fakte estas **pneŭmatika martelo**[5]**).** Ĝi estas tute ne — kiel vi asertas — identa al **kompresoro,** kiu tradukiĝas germanen per **„Kfz, Tech** Kompressor **m,** Verdichter **m**".

Kompreneble oni trovas en la vortaro (sur paĝoj 282 kaj 511) la kap-vortojn „Kompressor" kaj „Verdichter" kun la **ĝusta** traduko.

Plie: Vi atakas la Esperanto-ekvivalenton de „Fensterladen", kiu estas en la vortaro donita per **fenestrokovrilo,** (jalousieartig) **persieno,** kaj vi arogas al vi diri, ke „la pli oportunan kaj tute uzatan ‚ŝutro' li [t. e. mi, la vortaristo] ne konas".

La de mi listigita **fenestrokovrilo** estas ja vorto menciita en PIV [vidu paĝon 275][6]), kaj ĝi estas zamenhofa. Mi scias, ke WARINGHIEN preferas, ankaŭ en PIV, la formon **fenestrumo** (sampaĝe) kaj alialoke mencias la kvazaŭsinoniman **ŝutro**. Sed, pardonu, laŭ mi la zamenhofa **fenestrokovrilo** priskribas bone kaj plastike la celitan objekton kaj, evidente, ĝi superas la tute dubesencan um-vorton ‚fenestrumo'. Kaj kial do ĝi estu pli maltaŭga ol la neologisma **ŝutro** (kiun kompreneble mi konis verkante la vortaron]?

Sub alineo 4 de via recenzo [Aliaj mankoj] vi i. a. skribas:

„... oni vane serĉas multajn esprimojn, parolturnojn kaj proverbojn. Parte tio ŝuldiĝas al la ‚naturaj' limoj de ĉiu vortaro, sed parte ankaŭ al neglekto aŭ dubindaj selektaj kriterioj. Tiel, por ekzemplo, mankas preskaŭ la tuta skatologia vorttrezoro, sendube pli uzata al la terminologiaj geodezia, kibernetika aŭ fizika[7]). Vane oni serĉas la arsenalon de **Libro de Amo** aŭ ties germanajn ekvivalentojn. Oni ne scias, ĉu ridi aŭ ŝokiĝi, ke, laŭ Krause, ‚verkuppeln' estas ‚svati', dum jam Benne-instruas, ke temas pri ‚prostitui'[8]).

Por komenci pri via lasta aserto, mi ripetu kaj ĉiu uzanto de la vortaro sciu tion: Ankaŭ ĉi tie s-ro Haupenthal malpravas! La vorton **svati** Zamenhof pruntepreni el la rusa lingvo [сватать svatat'] kaj ĝi ekzakte ekvivalentas al la germana vorto ‚verkuppeln'[9]). Kaj **prostitui**[10]**),** nature, estas io tute alia!

Fine pri via skatologia prefero: Mi ne scias, ĉu vi vere pravas, ke preskaŭ la tuta vorttrezoro pri skato mankas. La legantoj mem juĝu, ĉar la vortaro listigas almenaŭ la jenajn vortojn pri tiu kartludo: reizen (p. 378), Wenzel (p. 555), Ober (p. 346), Kiebitz (p. 271), Eichel (128), Schelle (396), Rot (384), Herz (234), Pik (358), Kreuz (290), Karo, -dame, -könig (266), Stich (450), Bube (105), Auge (48), Blatt (95), Spielkarte (437), Farbe (163), stechen (446), ĉiuj provizitaj aŭ per la mallongigo **Skat** aŭ **Kart.**
Ĉu tio ĉi signifas, ke „preskaŭ ĉio mankas"? Oni povus, vere, inversi viajn vortojn kaj demandi, ĉu oni ne vere ŝokigu kaj ridu pri la recenzinto?

Mi povus [sed jam ne plu volas] forigi viajn ceterajn argumentojn, sed mi lasu tion. Forĵetu mian vortaron kaj komencu verki mem novan, pli taŭgan, pli perfektan, pli haŭpentalan!

1) Temas pri „Wörterbuch Deutsch-Esperanto", aperinta ĉe VEB Enzyklopädie Leipzig 1983, 594 p.

2) Temas pri la unua eldono de „Taschenwörterbuch Esperanto-Deutsch" en 1967 ĉe la sama eldonejo (190 p.), de kiu intertempe aperis kvar eldonoj [la kvina aperos en 1984].

3) Recenzo de HAUPENTHAL en „Okcidentgermana E-Revuo" (n-ro de novembro/decembro 1968).

4) Recenzo de WINGEN en „Germana E-Revuo" (Nürnberg, julio 1968), tiu de PECHAN en revuo „Esperanto" de UEA (julio/aŭgusto 1968).

5) Kaj ĝi eĉ konformas al la naturalisma postulo de Haupenthal, ĉar komparu: (france) marteau pneumatique kaj (ruse) pnevmatičeskij molot.

6) Oni nepre legu la klarigojn donitajn de WARINGHIEN sub **fenestrumo** kaj **ŝutro** (PIV, paĝo 1075).

7) Ĉiukaze ege subjektiva taksado, kiun leksikografo neniel rajtas subteni. Cetere: ĝenerala vortaro ne estas faka glosaro.

8) Evidente BENNEMANN erare indikis tiun ĉi vorton.

9) Oni komparu ankaŭ BOKAREV, Esperanta-rusa vortaro, p. 417, kie svati = svatat'

10) Komparu la PIV-klarigon de tiu vorto: devigi homon disponigi, kontraŭ pago, sian korpon al nedifinita nombro da aliaj homoj, por la kontentigo de ties seksaj bezonoj.

***) Postrimarko de la redakcio:**

Ĝenerale ni evitas en „der esperantist" polemikon kontraŭ artikoloj neaperintaj en nia revueto. Tamen ni volonte donis al d-ro Krause eblecon por sia prezento, ĉar li sufiĉe detale referas la menciitan artikolon, tiel, ke la leganto havos sufiĉan ideon pri la enhavo. Ni aldonas, ke estas vaste konata bedaŭrinda fakto, ke la fake ĝenerale bone informita kaj serioza esperantologo Haupenthal bedaŭrinde havas malfacilojn verki objektivajn recenzojn. Tiuj malfaciloj por li tiam estas aparte grandaj, se temas pri eldonaĵoj el socialismaj landoj. Ne malofte tiam ankaŭ suferas lia faka nivelo, kiel klare montros la repliko de d-ro Krause.

## Priterminologia diskuto daŭras

### Reago de Gaston Waringhien

Reage je mia letero al Michael Lennartz („de" 117) mi ricevis poŝtkarton el Parizo de 27. 8. 1983, kies enhavo ŝajnis al mi sufiĉe grava por diskonigi ĝin. Mi petis la skribinton pri publico-rajto, kaj li, tre afable, tuj donis sian konsenton. Jen la teksto:

„Estimata samideanino,

pri via letero terminologia en „der esperantist" no. 117, bonvolu noti, ke finfine, **mi aprobas la formon „komputi-komputilo-komputisto"** pro la ĝeneraliĝo de ĝia uzado. Kompreneble, **estos necese ŝanĝi la difinon** de tiu verbo en la nuna PIV kaj transdoni ĝin al alia (eble „komti"?).

Pri „cibernetiko" gvidis min ne la franca aŭ usona formo, sed la regulo, ke la grekaj vortoj komenciĝantaj per **kappa** transiris al la latina alprenante la latinan „c" antaŭ e, i kaj Y: greka „kedros", lat. „cedrus", Esp. **cedro**; „kiĥorion" = „cichorium" = **cikorio**; „kuklos" = „cyclus" =**ciklo** k. t. p. Tian, ĝis la malfeliĉa interveno de prof. Frank, sisteme akceptitan transskribon mi ne opiniis ŝanĝinda (krom por la modernaj geografiaj nomoj balkanaj: Trakio ks.).

Tre simpatie, via G. Waringhien"

Ŝajnas al mi, ke percipe la unua alineo de tiu komunikaĵo povus interesi tiujn fakulojn, kiuj pro troa respekto por „Plena Ilustrita Vortaro" ne kuraĝis sekvi la lingvouzon de la plimulto. Mi permesis al mi substreki tiujn frazopartojn kiuj ŝajnas al mi taŭgaj por fine ĉesigi longjaran senutilan batalon — „malpacon pri la reĝa palaco". Estu ĉi tiu komprenemo de nia granda vortaristo bona aŭguro por la laboro de internacia komputista komisiono,kiu jus okupiĝas pri la E-versio de internacia prikomputistika normo „ISO 2382". Regu ilin saĝa spirito de interkompreniĝo, por ke la rezulto de ilia peno fariĝu unu el la unuaj TeS-normo-proponoj. [TeS = Terminologia Sekcio de UEA]

W. Dehler

## Aperos interlingvistika verko en USSR

Dum la jaro 1984 en la eldonejo Nauka, Moskvo, aperos ampleksa kolektiva verko kun la titolo „Problemoj de internacia helplingo" (Problemy meždunarodnych vspomogatel'nych jazykov) sub la redakto de Magomet Isaev. La enhavo de la libro estas jena: **1a sekcio: Demandoj de la teorio kaj historio de la internacia helplingvo:** M. I. Isaev: Pri la stato kaj aktualaj problemoj de interlingvistiko kaj esperantologio; A. I. Berg / D. L. Armand / E. A. Bokarev: Internacia helplingvo de sciencoj; E. A. Bokarev: Kronologia listo de internacilingvaj projektoj (1925 — 1970); J. A. Baudouin de Courtenay: Nekonata parolado pri la problemo de internacia lingvo; D. Blanke (GDR): Projektoj de planlingvoj kaj la planlingvo; S. N. Kuznecov: Etapoj de la estiĝo de la interlingvistika teorio; A. D. Duličenko: El la historio de la interlingvistika penso en Ruslando (1900 — 1917); J. Ojalo: Interlingvistiko en Estonio; A. Ratkai (Hungario): Pri universala lingvo en utopiaj kaj fruaj socialismaj teorioj; Ja. M. Borovskij: La Latina kiel la internacia lingvo de scienco; A. M. Liĥtgejm: Konstruado de la grafika sistemo de internacia artefarita lingvo (IAL); M. Djačkov: Kelkaj apartaĵoj de la kreolaj lingvoj. **2a sekcio: Demandoj de la strukturo** Esperanto; **3a sekcio: Funkciado de la internacia helplingvo kaj la metodoj de ĝia studado:** D. L. Armand: Eblecoj kaj realeco de apliko de Esperanto en la scienco (je ekzemplo de geografio); B. V. Tokarev: Ĉefaj skoloj en esperanta poezio; L. I. Donskaja, A. B. Zisman: Al demando pri kategorio de aspekto en Esperanto; D. G. Lukjanec: La tradukoj de poeziaj verkoj de A. S. Puŝkin en Esperanto; A. M. Saĥnarovič, N. K. Rjabceva: Certaj psikologiaj problemoj de la instruado de internacia helplingvo; L. I. Donskaja: Bazoj de programigo de lernoagoj en procedo de la instruado de Esperanto; T. U. Kaganova: Pri metodika demando de la Esperanto-instruado kompare kun la instruado de fremdaj lingvoj; V. L. Ruĵevičius: Loko de Esperanto inter eksterlandaj lingvoj; **4a sekcio Aldonoj:** Listo de nomoj; Enhavo kaj resumoj en Esperanto.

La libron GDR-esperantistoj povas antaŭmendi ĉe „das internationale Buch", 1020 Berlin, Spandauer Str. 2 aŭ ĉe samfunkciaj distriktaj librovendejoj.

Grave:

La menciita libro estas anoncita en la eldonkatalogo de la eldonejo Nauka, IIa kvartalo 1984: Nauka. Plan vypuska literatury. II. kvartal 1984. Moskva 1983, p. 90. 328. Problemy meždunarodnogo vspomogatel'nogo jazykov Institut jazykoznanija. Moskva. Nauka 1984. 1 rublo 80 kopekoj. 3000 ekz. Mendonumero (?): 4602000000. Ĉirkaŭ 250 — 300 paĝoj.

# Ni kore gratulas

## Hans-Joachim Borgwardt — 60jara

La membro de la Centra Estraro de GDREA, Hans-Joachim Borgwardt el Stralsund, festis la 2an de marto 1984 sian 60an naskiĝtagon. La jubileulo tre aktive agadas en Stralsund, fondis originale laborantan grupon de ŝatantoj de ilustritaj poŝtkartoj- akcelis Esperanto-agadon inter gejunuloj kaj konsiderinde aplikas la internacian lingvon en la servo de la pacbatalo, i. a. por informado pri la sekvoj de la atombombojetoj sur Hirošimo kaj Nagasaki. Ni kore gratulas.

## Willi Vildebrand — 80jara

La 6an de marto 1984 sian 80an naskiĝtagon festis Willi Vildebrand el Berlin, iama prezidanto de Germana Laborista Esperanto-Asocio. La jubileulo kunfondis 1965 Centran Laborrondon Esperanto en Kulturligo de GDR kaj aktivis ĝis 1976 kiel ties vicprezidanto. GDREA kore gratulis.

## Werner Habicht — 75jara

La tre vigla iama laborista esperantisto el Waltershausen estas vaste konata en nia lando. Kiel membro de la Centra Estraro de GDREA kaj honora prezidanto de la Distrikta Estraro Erfurt li senlace agadas en la servo de la asocio. Li gvidis multajn kursojn, fondis divesrajn grupojn kaj tre ofte prelegis pri Esperanto kaj la laboristmovadaj tradicioj. Werner Habicht ne nur estas esperantisto sed ankaŭ rekonata aktivulo en la sferoj de la naturprotektado, geologio kaj loka historio. Ni kore gratulas al Werner, kiu festis sian jubileon la 20an de aprilo 1984 kaj ricevis la Johannes-R.-Becher-Medalon en Oro.

### Dankon de Werner Habicht

Al ĉiuj gekamaradoj, kiuj gratulis al mi okaze de mia 75a naskiĝtago per leteroj, kartoj, telegramoj kaj donacoj mi tutkore dankas.

## Kurt Güse — 60jara

La prezidanto de la Distrikta Estraro Schwerin kaj membro de Centra Estraro de GDREA, k-do Kurt Güse el Schwerin, festis la 14an de majo sian 60a naskiĝtagon. Li jam dum multaj jaroj apartenas al la stabile aktivaj esperantistoj en Schwerin kaj kune kun sia edzino, grave kontribuis al la evoluo de la agado. Ekde 1983 Kurt Güse transprenis la prezidantecon de la Distrikta Estraro. Li rapide enlaboriĝis montrante trankvilan kaj celkonscian gvidmanieron kaj scias harmonie veki respektive utiligi la laboremon de siaj kunkolektivanoj por la bono de la asocio. Ni kore gratulas al la jubileulo.

## Ludwig Schödl — 75jara

Sendube li estas unu el la plej rimarkindaj homoj en la historio de la Esperanto-movado de GDR, nia Ludwig, kiu fariĝos 75jara la 31an de oktobro 1984. Kiel junkomunisto li aktivis en la laborista Esperanto-movado, post 1933 partoprenis la ilegalan batalon kontraŭ la faŝismo per Esperanto, i. a. presis flugfoliojn en Esperanto pri la faŝisma teroro kaj sendis ilin eksterlanden. Post la milito li helpis kunkonstrui novan klerigan sistemon por Esperanto antaŭ la reoficialigo grave helpis al la fondo de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, en kies prezidio li dum multaj jaroj agis. Ludwig Schödl verkis la unuan lernolibron de Esperanto en GDR, ellaboris vaste uzatan materialon por korespondaj kursoj, mem gvidis multajn kursojn, faris sennombrajn prelegojn, gvidis grupojn, verkis, tradukis ... kaj ĉion li faras per juneca fervoro kaj entuziasmiga viglo. Neniu kredos al li la 75 jarojn. Ankaŭ ni ne. Tamen ni kore gratulas.

## Hanna Scheffs – 70jara

Eble ne decas tro trompeti, ke Hanna Scheffs fariĝos 70jara la 23an de novembro 1984. Sed ĉiuj ŝin konantaj ja scias, ke ŝi estas laŭ aktiveco kaj engaĝo multe pli juna. Prezidantino de la Distrikta Estraro Potsdam kaj membro de la Centra Estraro de GDREA Hanna Scheffs havas grandajn meritojn por la sistema agado en la distrikto Potsdam kun multaj aranĝoj, kiuj servis al la tuta asocio. Nur lerninte la lingvon antaŭ 10 jaroj Hanna rapidege fariĝis valora aktivulino de la asocio kaj mirinde celkonscie kaj politike tre klare majstris la taskojn.
Plenmerite ŝi ricevis la plej altan distingon de Kulturligo de GDR, la Johannes-R.-Becher-medalon en oro. Ni esperas pri ankoraŭ longa kunlaboro kaj kore gratulas.

**Ni kore gratulas ankaŭ:**

— al d-ro Till Dahlenburg el Brüel, membro de la Centra Estraro de de GDREA, kiu festis sian 50an naskiĝtagon la 19an de januaro 1984,

— al Hanna Scheffs el Potsdam, membro de la Centra Estraro de GDREA, kiu estis distingita la 19an de majo 1984 per la Johannes-R.-Becher-Medalo en Oro, la plej alta distingo de Kulturligo,

— al Walter Busse el Magdeburg, kiu festis sian 85an naskiĝtagon la 24an de januaro 1984,

— al la iama laborista esperantisto Rudi Weiß el Zwickau, kiu festis sian 70an naskiĝtagon la 22an de aprilo 1984,

— al la iama laborista esperantistino Ino Kolbe el Leipzig, kiu fariĝis 70jara la 28an de februaro 1984,

— al la iama laborista esperantisto Helmut Fuchs el Pirna, iama membro de Centra Laborrondo Esperanto, membro de la Internacia Komitato de MEM kaj honora civitano de la urbo Pirna, kiu festis sian 75an naskiĝtagon la 18an de aprilo 1984,

— al la iama laborista esperantisto Ernst Diedrich el Warin, kiu fariĝis 75jara la 30an de marto 1984,

— al la internacie konata laborista esperantistino kaj pacbatalantino, la franca komunstino Marcello Robineau el Seignelay/Francio, kiu fariĝis 80jara fine de 1983,

— al Jaroslav Mařík el Praha, elstara ĉeĥa esperantisto kaj tradukisto, kiu fariĝis 70jara, la 22an de decembro 1983.

## Profesoro d-ro Juan Régulo

Gratuloj iras al la fama esperantisto, eldonisto kaj esperantologo, al la lingvisto d-ro Juan Régulo el la Laguna, ĉefurbo de Kanariaj Insuloj. La tre afabla kaj simpatia Don Régulo, kun kiu mi ofte havis la plezuron renkontiĝi, fariĝis la 30-an de marto 1984 70jara. Dum pli ol 30 jaroj li deĵoris kiel profesoro pri romanida lingvistiko ĉe la universitato de la La Laguna, kiel katedestro. Li krome estas lektoro por Esperanto. La ĉefa merito de profesoro Régulo estas la eldonejo Stafeto, kiun li fondis en la jaro 1952. Ĝis meze de la 70aj jaroj, en tiu eldonejo la profesoro eldonis pli ol 90 valorajn volumojn, kiuj grave pliriĉigis la esperantlingvan literaturon, beletran, lingvistikan kaj natursciencan. La eldonejo kunfandiĝis dum la 70aj jaroj kun tiu de Torben Kehlet kaj fariĝis TK/Stafeto.

Prof. d-ro Juan Régulo Pérez, membro de la Akademio de Esperanto, ankaŭ estas elstara esperantologio, kiel pruvas liaj studoj i. a. en la revuo „Esperantologio".

Substrekendas, ke la jubileulo ĉiam estis tre malavara subtenanto de novaj talentuloj al kiu li donacis librojn kaj subtenis iliajn klopodojn. La jubileulo apartenas al la plej rimarkindaj figuroj de la nuntempa Esperanto-movado. Ni esperu pri ankoraŭ multaj fruktoj de liaj aktivaĵoj. **D. Blanke**

## Gratulon al Hristo Gorov

La prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, la elstara socia aktivulo, verkisto kaj esperantisto, k-do Ĥristo Gorov, festis la 18an de julio 1983 sian 75an nasiĝtagon. Pro liaj meritoj la prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro de Bulgario kaj Ĝenerala Sekretario de Bulgara Komunista Partio, Todor Ĵivkov, distingis lin per la titolo „Heroo de Socialisma Laboro".
GDREA tre kore gratulas al la bona amiko de la esperantistoj en GDR kaj deziras ankoraŭ multajn jarojn da persona bonfarto kaj freŝa aktiveco.

## Nikola Aleksiev — pioniro kaj veterano

Antaŭnelonge aperis bonega broŝuro el la plumo de Nikola Aleksiev „Pioniroj kaj veteranoj de MEM". Rimarkinde estas inter alie, ke la verkinto mem estas unu el la plej eminentaj pioniroj kaj veteranoj de MEM kaj de la nuntempa internacia kaj bulgara Esperanto-movado. Al tiu elstarulo ni direktas niajn plej korajn salutojn okaze de lia 75a naskiĝtago, la 29an de junio 1984. Aleksiev estas rimarkinda homo. Juna studento li aliĝis al la komunista movado, aktivis en la sindikatoj, dum jaroj gvidis la Bulgaran Laboristan Esperanto-Asocion (BuLEA) kaj post la milito kunkonstruis la modernajn bulgarajn sindikatojn. Dum longa periodo li estis prezidanto de MEM kaj BEA. Pro liaj elstaraj meritoj por la evoluo de Mondpaca Esperantista Movado oni elektis Nikola Aleksiev ties honora prezidanto. UEA honorigis lin per la titolo „Honora Membro". La bulgara ŝtato distingis lin per altaj ordenoj, i. a. „Heroo de socialisma laboro". Kulturligo distingis lin per per la Johannes R. Becher-Medalo en oro. Oni ne kredu, ke la 75-jarulo ĉesis aktivi, ripozas. Kontraŭe, ĉiam denove aperas artikoloj, broŝuroj, libroj — en la bulgara kaj en Esperanto. Aleksiev estas fekunda spirito, klarvida komunisto, komprenema kaj tolerema amiko kaj elstara oratoro. Generacioj de lernemaj esperantistoj estas profunde influitaj de lia ĉarma personeco. Gratulojn al tiu amiko de GDR, de GDREA.

---

**Seminare in Lychen: Anmeldungen noch möglich!**

Für folgende Seminare, die kostenlos sind, akzeptiert der Esperanto-Verband noch Anmeldungen:

1. 11. Jugendbasisseminar, 4. — 9. 11. 1984. Es können junge Esperantisten (auch Anfänger) bis 25 Jahre teilnehmen. Das deutschsprachige Seminar behandelt in Vorträgen und Seminaren Probleme der internationalen Esperanto-Bewegung sowie Fragen der Tätigkeit des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR.
2. Expertenseminar vom 25. — 30. 11. 1984. Das Seminar wird völlig in Esperanto durchgeführt. Teilnahmeberechtigt sind nur gut sprechende Esperantisten. In Vorträgen und Seminaren werden theoretische und praktische Fragen des Esperanto und seiner Bewegung auf hohem theoretischem Niveau behandelt.

Anmeldewünsche sind zu richten an: Esperanto-Verband, 1080 Berlin, Charlottenstraße 60

## Gratulojn al prof. d-ro Ignac Florian Bociort

La fondinto kaj scienca motoro de la aktuala esperantista kaj interlingvistika movado en Rumanio, univ. profesoro d-ro Ignac Florian Bociort festos la 13an de decembro 1984 sian 60an naskiĝtagon. La internacie rekonata filologo kaj kulturteoriisto dum nur malmultaj jaroj kreis en Rumanio seriozan sciencan bazon por novstila Esperanto-movado, intime ligita kun la ĉefaj problemoj de interlingvistiko kaj grave portata de junaj intelektuloj. El lia plumo venis aro de elstaraj rumanaj artikoloj pri la lingva problemo kaj Esperanto kaj kelkaj antologioj kaj gramatikoj. Multaj esperantistoj el GDR persone konas la profesoron, kiu dum kelkaj jaroj estis gastdocento ĉe Humboldt-Universitato en Berlin kaj el Berlin kunprenis impulsojn por sia interlingvistika agado.
Al la jubileulo ni deziras ĉion bonan, pluajn sukcesojn en la profesia kaj interlingvistika sferoj kaj, aparte, sanon kaj feliĉan estontecon en la persona vivo.

CE de GDREA

## Forpasis Walter Röhner

La 29an de majo 1984 Walter Röhner el Coswig ĉe Dresden estus fariĝinta 75jara. Sed la morto estis pli rapida kaj falĉis nian kameradon kaj amikon la 8an de aprilo 1984.
Walter Röhner dum multaj jaroj estis prezidanto de la Distrikta Estraro de GDREA Dresden kaj poste ties honora prezidanto. Li estis membro de la Centra Estraro de GDREA kaj grave kontribuis al la celkonscia evoluigo de la agado de la asocio en la distrikto Dresden. Walter Röhner, iama laborista esperantisto kaj enkarcerigito en nazia koncentrejo, aparte laboris por la pliprofundigo de la amikeco kun la esperantistoj en Leningrado. Longjara amikeco ligis lin kun prof. S. N. Podkaminer. Dufoje li organizis amikectrajnojn al Leningrado. La forpasinto aktive kaj konstruive, kun granda politika klereco, partoprenis la laboron de la Centra Estraro de GDREA. Ni honore gardos lian memoran.

CE de GDREA

## Forpasis Josef Vitek

La 8an de novembro 1983 forpasis la internacie konata aganto de Ĉeha Esperanto-Asocio Josef Vitek. Li estis dum multaj jaroj agema prezidanto de Ĉeha Esperanto-Asocio, organizanto de multaj esperantistaj aranĝoj kaj havis tre bonajn amikojn ankaŭ en GDR. Ni esprimas al la familio kaj al ĈEA nian kondolencon.

Centra Estraro de GDREA

**Ni funebras**

— pro la forpaso de la iama laborista esperantisto kaj aktiva membro de nia asocio Alfred Ehrlich el Karl-Marx-Stadt, la 19an de novembro 1983,
— pro la forpaso de Rudolf Müller el Karl-Marx-Stadt, en la aĝo de 83 jaroj, fine de 1983,
— pro la forpaso de Rudolf Masek el Neudietendorf, la 3an de februaro 1984.
— pro la forpaso de elstara bulgara verkistino kaj esperantistino Rajna Konstantinova el Sofio, kiu mortis dum la tagoj de la 68a Universala Kongreso 1983 en Budapest.
— pro la forpaso de d-rino Clelia Conterno Guglielminetti 22. 1. 1984 en Torino, Italio, eminenta literaturistino, membro de la Akademio de Esperanto.

## Rund ums Bier

Viele mögen es, die wenigsten aber kennen es so gut, wie man einen guten Freund kennen sollte. Vom Bier ist hier die Rede, das in den letzten Jahren eine ungezählte Schar neuer Anhänger gewonnen hat. Es wird oft und gern getrunken: Im Interhotel wie in der gemütlichen Eckkneipe, vor dem heimischen Bildschirm oder bei feuchtfröhlicher Geselligkeit. Es ist ein volkstümliches Getränk, von dem die meisten herzlich wenig wissen, von dem wir aber mehr wissen sollten.
Im Lexikon kann man unter dem Stichwort Bier nachlesen:
„Aus Malz, Hopfen, Hefe und Wasser durch Gärung hergestelltes alkoholisches Getränk." Damit ist mit wenigen Worten schon sehr viel gesagt über die Grundstoffe, die für die Herstellung des Bieres unerläßlich sind. Keiner darf fehlen: Aus Gerste wird Malz gewonnen, aus dem wiederum entsteht im Brauprozeß die Bierwürze. Solche Würze allerdings könnte man literweise trinken, ohne die geringste alkoholische Wirkung zu verspüren. Auch würde man vergeblich jenen zartbitteren Geschmack suchen, der am Bier geschätzt wird. Dafür wieder ist Hopfen nötig, und durch Zusatz der gärungserzeugenden Hefe entstehen aus dem Malzzucker Alkohol und Kohlensäure. Am Beginn des Brauens steht das Brauwasser, dessen Qualität wesentlich die Güte des Bieres mitbestimmt. Alles zusammengenommen gibt den unverwechselbaren Geschmack des Bieres.
Nicht ohne Grund nennt man das Bier auch „flüssiges Brot". Beispielsweise ist in einem Glas Bier genausoviel Eiweiß enthalten wie in 120 Gramm Milch oder 60 Gramm Brot oder 25 Gramm Fleisch. Hinzu kommt der Vitamingehalt des Bieres.
Dem passionierten Biertrinker braucht man wohl Wert oder Unwert seines Leib- und Magengetränks nicht näher zu erläutern. Da gibt es eine Regel, die — mag sie auch nicht ernst gemeint sein — doch etliche Körnchen Wahrheit enthält:

Ist der Biertrinker gesund, so trink er aus Antrieb der Kraft;
ist er krank, so trinkt er, weil Bier hilft.
Ist er durstig, so trinkt er, weil Bier löscht;
ist er nicht durstig, so trinkt er,
weil in und mit ihm was los sein muß.
Ist er hungrig, so trinkt er, weil Bier die Verdauung fördert;
Ist ihm warm, so trinkt er Bier, weil es kühlt;
ist ihm kühl, so trinkt er Bier, weil es wärmt.
Ist er aufgeregt, so trinkt er, weil es beschwichtigt;
ist er abgespannt, so trinkt er, weil es anregt.
In melancholischer Stimmung trinkt er Bier,
weil es heitere Gedanken macht;
ist er lustig, trinkt er es, weil es ihn wieder zu sich bringt.
Ist er schlaflos, so trinkt er Bier zu guter Ruh;
ist er schläfrig, so erhält Bier ihn wach.

Kurz: der echte Biertrinker weiß für jede Gelegenheit den Trunk zu motivieren.

(Aus: Rund ums Bier, von Emil Ulischberger)

[Komparu la kondiĉojn en der esperantist 1/84 (123) p. 13]

### Traduk-konkurso 1 — 3/1983: La venkintoj

La traduk-konkurso, kies sekvoj ni publikigis en la n-roj 1 — 6/1983 de „der esperantist" gajnis grandan intereson kaj pruviĝis tute aloga kaj necesa entrepreno. Partoprenis meze ĉirkaŭ 30 konkursuloj, inter ili eĉ kelkaj eksterlandanoj. Tripersona jurio el lingve kompetentaj esperantistoj prijuĝas la anonimajn (senigitajn de nomoj kaj adresoj) konkursaĵojn kaj disdonas poentojn pri enhava adekvateco, lingva ĝusteco kaj stila boneco. Kalkulante la mezan poentonombron oni ricevas la venkintojn. Ĉiuj partoprenantoj ricevas la rezulton de la unuopa konkurso kaj la venkintan konkursaĵon.
Jen la venkintoj de n-roj 1 — 3/84:
1. Klaus-Dieter Dungert, Magdeburg
2. D-ro Martin Schüler, Kleinmachnow
3. Karl-Heinz Sommer, Erfurt.

Ili ricevis libropremion.

**La plej bonaj post tri taskoj estas:**

| | | |
|---|---|---|
| 1. | D-ro Martin Schüler — Kleinmachnow | — 111 poentoj |
| 2. | Gerhard Hornbogen — Weimar | — 104 poentoj |
| 3. | Uwe Werner — Zeitz | — 96 poentoj |
| 4. | Otto Möller — Heiligenstadt | — 93 poentoj |
| 5. | Oskar Stolberg — Leipzig | — 92 poentoj |

# El la agado de MEM

## VI-a Renkontiĝo de pacdefendantoj en Pardubice

De 23a ĝis 25a de marto 1984 en Pardubice okazis la tradicia renkontiĝo de pacdefendantoj, ĉi-jare do la 6a.
Partoprenis pli ol 700 esperantistoj el 11 landoj (Kompare al tio: 1983 partoprenis 300). Ili venis el ĉiuj socialismaj landoj, sed ankaŭ el Anglio, Francio, Norvegio, Finnlando, Belgio, Nederlando kaj FRG. Ilin kunigis la komuna volo demonstri, ke ankaŭ la esperantistoj staras en la vicoj de la pacbatalantoj (iuj proponis „paclaboristoj"). La bonege organizita manifestacio okazis en la Kulturdomo Dukla. La renkontiĝon ankaŭ partoprenis la prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), d-ro Imre Pethes. La MEM-Komisionon ĉe Centra Estraro de GDREA reprezentis ties membro pastoro Hans-Jürg Kelpin, prezidanto de la Distrikta Estraro de GDREA Erfurt. El GDR entute partoprenis pli ol 50 esperantistoj. La partoprenintoj de la VI-a renkontiĝo havis abunde la eblecon interŝanĝi ideojn kaj opiniojn pri tio, kion oni komprenu sub pacbatalo, kiaj kondiĉoj necesas por konservi la pacon kaj kiuj komunaĵoj kaj specifaĵoj distingas la aktualan mondvastan pacmovadon. Bonan eblecon por tio donis la tri diskutgrupoj a) MEM kaj kunlaboro kun la Monda Packonsilantaro (MPK) b) Unuiĝintaj Nacioj, UNESKO kaj pacdemandoj c) Scienco kaj tekniko en porpaca batalo.
Kompreneble ne ĉiam la opinioj povis esti samaj, sed la fruktodona diskuto por ĉiu donis pruvon por la komuna pacvolo. La partoprenantoj ankaŭ vizitis la memorlokon Ležáky, vilaĝo, kiu estis likvidita de germanaj faŝistoj, simile kiel Lidice.
Ankaŭ la kultura kaj ekskursa kadra programo kontribuis al la sukcesa aranĝo. Menciindas aparte la scenaĵo „Infanoj sur la ludejo", kiun tre imprese prezentis la ĉeha aktorino Eva Seemanová. La aŭskultantoj ricevis impreson pri eventuala venonta milito, post kiu preskaŭ neniu kaj nenio plu restos sur la tero. Grandan atenton al la renkontiĝo donis la urbaj aŭtoritatoj kaj la ĉehaj amasmedioj.
La urbestraro de Pardubice kaj la vicprezidanto de Orientbohemia Regiona Nacia Komitato en Hradec Králové akceptis delegaciojn. Ĉe la fino partoprenintoj akceptis (kun 1 kontraŭvoĉo) Alvokon, kiun ni publikigas sekve.

(Laŭ Rudolf Eichler kaj Maria Jenzen)

## ALVOKO

La partoprenintoj de la VI-a renkontiĝo de pacdefendantoj, kiu okazis dum la tagoj de la 23. — 25. de marto 1984 en Pardubice, Ĉehoslovakio, konstatis, ke la dislokado de la nukleaj raketoj de la unua frapo, komencita en la jaro 1983 en la okcidenta Eŭropo, tiel kiel ĝi estis difinita jam en la „ALVOKO POR PACO KAJ VIVO, KONTRAŬ LA NUKLEA MILITO" de la praga Tutmonda PAC-ASEMBLEO en junio 1983, alportis impetan pligrandigon de la danĝero de la nuklea konflikto, kiu ekkaptus la tutan mondon. Esperantistoj, partoprenintoj el landoj kun diversaj sociaj reĝimoj, homoj de diversaj naciecoj, de diversaj politikaj opinioj kaj religiaj konvinkoj akordiĝis en tio, ke la paco estas konservenda.
Ili konstatis, ke la paca movado en la socialismaj landoj fontas el bezonoj de la popolo en ĉi tiuj landoj, ke ĝi plene harmonias kun la celoj de la Tutmonda Paca Movado kaj estas en harmonio kun la ŝtata politiko de la socialismaj ŝtatoj, por kiuj la paco kaj la paca kunvivado inter ŝtatoj de diversaj politikaj reĝimoj estas baza angulŝtono de ilia plua ekonomia kaj kultura evoluo.
Ili opinias natura, ke la socialismaj ŝtatoj estas devigataj kontraŭ la minaco de la usonaj nukleaj raketoj en la okcidenta Eŭropo fari tiajn aranĝojn, por konservi forto-ekvilibron kaj tiel obstakli uzon de la raketoj de la unua frapo.
Kun kontento ili konstatas, ke plue validas unuflanka devoligo de Sovet-Unio pri neuzo de la nukleaj armiloj kiel la unuaj. Revokante sin je la „ALVOKO" de la praga junia Tutmonda Pac-Asembleo en la jaro 1983 kaj je tio, ke la popoloj de ĉiuj landoj en sia absoluta majoritato deziras la pacon, la partoprenintoj de la renkontiĝo invitas ĉiujn esperantistojn de la mondo, asociigitajn en siaj interes-organizoj, ke iliaj landoj plialtigu la strebadon pri konservo de la paco, ke ili penadu pri tio, ke ili

— vastigu vicojn de esperantistoj-pacdefendantoj.
— ke la devontigon de Sovet-Unio neuzi la nukleajn armilojn kiel la unuaj, akceptu pluaj ŝtatoj, ĉefe Usono.
— ke unuopaj ŝtatoj devoligu sin malaltigi de jaro al jaro budĝeton destinitan por armil-produktado.
— ke estu ĉesigita ne nur la dislokado de la nukleaj armiloj en la landoj de la okcidenta Eŭropo, sed ke la jam dislokitaj armiloj estu retiritaj kaj tiel ke estu plenumita la baza kondiĉo por la plua traktado pri likvido de ĉi tiuj armiloj same en okcidento kiel en oriento.
— ke estu ĉesigita produktado kaj dislokado de pluaj armiloj de amasdetruado kie ajn en la mondo, ĉu temas pri armiloj bakterologiaj, biologiaj, kemiaj, radiologiaj, eventuale aliaj.

— ke estu malhelpita disvastigado de armiloj de kia ajn speco kaj de kiu ajn en la kosman spacon kaj esti atingite, ke la kosma spaco estu paca spaco, spaco por la plua paca evoluo de la popoloj de la planedo Tero.
— ke inter ŝtatoj de diversaj politikaj reĝimoj estu enkondukitaj rilatoj de la reciproka konfido, kultura kaj ekonomia kunlaboro.
— ke la popolo de unuopaj landoj komprenu, ke kia ajn homa scipovo, minimuma kvanto de materialo kaj energio de kia ajn speco, uzita por produktado de kiaj ajn armiloj, atentante la malgrandiĝantajn materialajn kaj energetikajn fontojn de nia planedo, estas krimo kontraŭ la homaro, ĉar en siaj konsekvencoj ĝi signifas malaltigadon de ebloj, nuntempe ekzistantaj, por plua paca evoluo de la homaro.

Ni, esperantistoj, uzantoj de la internacia lingvo Esperanto, kies ĉefa strebado estas interkomprenigo inter la homoj de la tuto mondo, ni konscias tion, ke la armado kaj ĝia eskalado alportas al la homaro senmezurajn domaĝojn. Same la agresoj elvokataj en diversaj partoj de la mondo gradigas danĝeron de la tutmonda milita brulego. Tial ni, aktive partoprenantaj la Turmondan Pacan Movadon multobligos nian strebadon kaj transigos ĉi tiun nian pacan aktivecon sur la vastan publikon de niaj landoj, kun la penado, ke en ĉi tiun proceson estu envicigitaj ankaŭ tiuj homoj ĝis nun flanke starantaj.
Venko de la pacamaj homoj en ĉi tiu batalo signifas savon de nia planedo — savon de la vivo sur ĝi.

Pardubice 24. 3. 1984

Prezidantaro
de la VI-a renkontiĝo de
pacdefendantoj en Pardubice,
Ĉeĥoslovakio.

## Renkontiĝo kun pacbatalantino de Greenham Common

Dum la VI-a Renkontiĝo de Pacdefendantoj dum marto 1984 en Pardubice mi havis eblecon konatiĝi kun Helen Trask (Anglio), kiu dum la porpacaj diskutoj estis impresinta la pli ol 600 partoprenintojn per sia raporto pri la virinoj en Greenham Common. Helen Trask jam ne estas juna virino — ŝi fiere portas la insignon „Avinoj por la Paco". Tamen ŝi fariĝis kunfondintino de diversaj porpacaj iniciativoj en sia hejmlando, ŝi vizitis Greenham Common kaj tutan jaron vivis en Molesworth (t. e. unu el aliaj nukleaj bazoj en Granda Britio). Tie ŝi prenis strecojn sur sin — kiel ekzemple vintre la tranoktadon en tendoj — por kontribui al la konservada de la paco. La porpaca rezolucio, akceptita de la partoprenintoj de la renkontiĝo, kompreneble ankaŭ ricevis la kontenton de Helen Trask.

Sabine Fiedler

## Artikolo de Pethes en gravega revuo de MPK

Monda Packonsilantaro eldonas la revuon „Novaj Perspektivoj" en la lingvoj angla, franca, germana, hispana kaj japana. Ĝi aperas 6-foje jare kun po 32 paĝoj, ilustrita, formato A 4. Ĉefredaktoro de la revuo estas la prezidanto de Monda Packonsilantoro Romesh Chandra, kiu plurfoje esprimis sian simpation por Esperanto kaj aprezon por la laboro de MEM.
En n-ro 2/1984, p. 30, oni trovas bonegan tutpaĝan artikolon de la prezidanto de MEM, d-ro Imre Pethes „30 jaroj pacmovado de esperantistoj", kiu skizas la evoluon kaj aktualan agadon de MEM. Ŝajnas, ke tiu artikolo estas la plej granda kaj plej grava, aperinta ĝis nun en oficialaj eldonajoj de MPK.

## Esperantista Printempa Pacmarŝo Jablonec 1984

La 21an de aprilo 1984 la Esperantista Klubo de Jablonec nad Nisou aranĝis la dekduan Printempan Pacmarŝon, kiun partoprenis 380 esperantistoj el ĈSSR kaj ankaŭ el Görlitz, Hoyerswerda kaj Reichenbach. La amika vespero kun la gastoj el GDR konvinke demonstris la pacvolon kaj amikecon de esperantistoj el ambaŭ landoj. Ili ĉiuj intencos denove partopreni la pacmarŝon en la jaro 1985.

## Ĉeĥoslovaka numero de „Paco" 1983

Ĉiuj abonintoj de „Paco" kaj aliaj interesuloj laŭpete senpage ricevos de GDREA la ĉeĥoslovakan eldonon de eksterseria numero de „Paco" 1983. La 32paĝa kajero, redaktita de inĝ. Margit Turková, entenas i. a. ampleksajn raportojn pri la Porpaca Kongreso (julio 1983 en Praha), rememorojn pri la elstaraj ĉeĥaj esperantistoj Jaroslav Novobilsky kaj Jaroslav Ježek (komponisto), skizon pri 30 jaroj MEM, artikolojn pri la ĉeĥaj kontraŭfaŝistoj Marie Kudeřiková kaj Julius Fučik, materialojn pri la verko de Jaroslav Hašek, la politikan deklaron de la ŝtatoj-anoj de Varsovia Kontrakto kaj aliajn kulturpolitikajn materialojn.

## Materialoj pri Uzbekistano serĉataj

Samarkanda Esperanto-Klubo kunlabore kun la regiona filio de Uzbeka Amikeca Asocio organizas oktobre 1984 la internacian ekspozicion „Uzbekistano tra la okuloj de eksterlandanoj", dediĉitan al 60-jariĝo de Uzbeka SSR. Tiucele estas kolektataj eldonitaj eksterlande ĉiulingvaj tiutemaj libroj, revuoj, verkoj de uzbekoj aŭtoroj, tagĵurnaloj, fotoj, plakatoj, pentraĵoj, versoj, kantoj kaj ĉiuj ceteraj materialoj pri Uzbekistano. Estas atendataj ankaŭ leteroj kun vojaĝimpresoj pri Uzbekistano publikigotaj en nia nacilingva gazetaro.
Ni petas ĉiulandajn esperantistojn helpi nin ĉu per sendado de konvenaj materialoj, ĉu per aperigo de ĉi-teksto en nacilingvaj kaj esperantlingvaj periodaĵoj.
Al ĉiu helponto ni sendos respondleteron kaj laŭdeziran uzbekan memorajon.
Bonvolu adresi ĉion plejeble baldaŭ al: Interklubo „Esperanto", SU-703000 Samarkando, Glavpoĉtamt, abon. ja. 76, Uzbekistano.
Anticipajn dankojn al ĉiuj kontribuontoj! Represo kaj nacilingvaj anonctradukoj petataj!

# El Vjetnamio

## Arangô en Ho-Chi-Minh-urbo

La 15an de decembro 1983 en la Domo de Kulturo Q. I. okazis solena E-vespero. Ĉeestis kamaradoj: Nguyen Minh Kinh, centraj komitatanoj, gelernantoj de E-kursoj, gastoj de diversaj oficoj kaj fakoj. La renkontiĝon malfermis per kantmuzika programo Nha Van Hoa Q. I. Komence, rememorojn pri „Unuaj tagoj de la fondiĝo de VPEA (1956, dec. 9) prezentis la veterano Ngo Minh Kinh (fremdlingva eldonejo, Hanojo), centra komitatano de E-Asocio. Li ripetis la brilajn ekzemplojn de nia forpasinta Esperanto-Prezidanto Nguyen Van Kinh por revoluciuloj kaj por Esperanto-aktivuloj kaj informis pri vjetnamaj esperantajoj kaj la monda opinio pri tio.

Interesan raporton pri la vivo kaj agado de d-ro L. Zamenhof, kreinto de la internacia lingvo, legis semideano Nguyen Do Khanh, prezidanto de la Esperanto-klubo, plue pri la rolo kaj signifo de Esperanto kiu ekzistas jam 96 jarojn, pri 75 jaroj UEA kaj 30 jaroj MEM.

Kvin kantojn en Esperanto plenumis gelernantoj el la Esperanto-klasoj sub la gvido de la instruisto Fan Duc Thanh. La partoprenantoj trarigardis kutiman riĉenhavan Esperanto-ekspozicion: multe da presajoj de Vjetnamio, el la mondo, fotoj, korespondajoj kaj belaj Esperanto-bildkartoj k. t. p.

Per tiu ĉi tradicia arangô, la nove fondita Esperato-klubo komencis la plenumon de sia ampleksa programo por la propagando de Esperanto en la universitato, en oficejoj kaj fakoj. La publiko entuziasme kaj varme aplaŭdis la plenumantojn, esprimente sian kontentecon pri tiu vere bona Zamenhofa festo.

N. D. Khánh, VPEA, Ho-Chi-Minh-urbo

## Festo de la jubileo de MEM en Ho-Chi-Minh-urbo

En la urbo Ho-Chi-Minh oni fine de 1983 solene jubileis la 30jaran datrevenon de la fondiĝo de Mondpaca Esperantista Movado. La kunveno okazis en ornamita salono, en kiu estis legebla la okulfrapa eldiro de Romeŝ Ĉandra: „Esperanto kaj Paco estas du vortoj, kiuj plej konsiderinde signifas la samon". Komence s-ano Pham Duc Thanh malfermis kaj bonvenigis la gastojn, geesperantistojn kaj gelernantojn.

Eksonis kun akompananta muziko „La Espero", prezentita de entuziasmaj junaj amatoraj membroj de nia Esperanto-klubo. Unu kortuŝan minuton da silento oni dediĉis al la memoro de la forpasinta la fondinto kaj animo de nia Esperanto-movado, la eksprezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, s-ano Nguyen Van Khinh.

Knocizan raporton pri la historio kaj signifo de la fondiĝo de MEM faris nia veterana esperantisto Nguyen Hai Trung. Li resumis la longan malfacilan kaj fruktodonan vojon dividitan je diversaj periodoj.

Resumis abunde kaj alloge la Esperanto-agadojn en la mondo dum la tri lastaj jaroj nia Esperanto-aktivulo Nguyen Do Khanh.
S-ino Hoang Minh Phung spite al sia aĝo verve deklamis kortuŝan propran freŝverkitan poemon „30 jaroj MEM" en Esperanto kaj nacilingve. Estis ankaŭ arangita en la „Aŭtuna Renkontiĝo", ekspozicio de esperantajoj, kiun la ĉeestantoj avide rigardis, kun donacajoj de VPEA, de E-klubo „Esparo" el la ĝemelurbo Leningrad/SU, kaj kun aliaj materialoj kolektitaj per korespondado kun alilandaj esperantistoj.

En la sama tago aperis en la jurnalo „Sajgon liberigita" artikolo „Mondpaca Esperanto-Movado-30jara" de N. H. Trung. La festo fermiĝis en la plej varma atmosfero, dum kiu oni promesis bone sekvi la vojon de MEM.

N. D. Khanh, VPEA

# Somera Esperanto-Tendaro en Lancov/ČSSR



La tradiciaj Someraj Esperanto-Tendaroj (SET) en Ĉeĥoslovakio dum tri jardekoj donis gravan kontribuon al la movado enlanda kaj internacia. Ili komenciĝis tre modeste en la jaro 1952. En tiu tempo la ĝenerala Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio maloficialiĝis, malaperis la firma grundo por plua laboro. La ĉeĥoslovaka Esperanto-junularo, aktive aganta la jaro 1950, serĉis novajn laborkampojn kaj novajn metodojn por gajni freŝajn junajn fortojn por la movado. Unu el la nove naskiĝintaj ideoj estis tiu pri la Someraj Esperanto-Tendaroj. La tendaro, finance malmulte-kosta kaj tial alirebla por junularo, respondis plene al la gejunula romantika vivo en gesamideana medio, meze de libera naturo kun alloga kaj interesa programo. Tuj la unua tendaro rikoltis ĉe siaj partoprenintoj grandan sukceson. Ripete estis do aranĝataj Someraj Esperanto-Tendaroj (SET) — ankaŭ en sekvaj jaroj kaj al la tradicio daŭras ĝis nun.

Dum sia longjara ekzisto la tendaroj okazis en diversaj lokoj de ČSSR, sed la plej oportuna montriĝis la ĉarma ĉirkaŭaĵo de la barajlago Vranov en suda Moraĉio. Ekde la jaro 1958 la tendaro definitive estis lokigita proksime de la vilaĝo Lanĉov, kie estis dum postaj jaroj finkonstruita necesa bazo garantianta komfortan kaj agrabaln restadon en naturo kaj ankaŭ sufiĉan efikon instruan kaj edukan: granda kabano kun kuirejo, kabano por komunaj programoj dum la tempo pluvovetera, romantikaj tendoj kaj vico da etaj 4-litaj kabanetoj kaj, kompreneble, ankaŭ sufiĉa higienia ekipaĵo.

La Someraj Esperanto-Tendaroj en Lanĉov tiel ekokupis gravan lokon en la konscio de la esperantistaro, sed ankaŭ de vasta publiko en ČSSR. Tion dokumentas plej konvinke la nombro de partoprenintoj, nome dum 30 jaroj pli ol 6 000 personoj. SET-oj ĉiam reprezentis stimulan faktoron por la enlanda Esperanto-movado. En ilia medio ensorbis la partoprenintoj entuziasmon kaj fakan scion por plua Esperanto-laboro. La SET-oj meritiĝis grandparte pri la nivelo de la movado en tempo de neekzistanta centra Esperanto-organizaĵo en Ĉeĥoslovakio.

La tendaroj estas dekomence antaŭ ĉio lernejo de Esperanto. La studprogramo, al kiu estas dediĉita ĉiutaga antaŭtagmezo, enhavas jenajn fakojn: gramatiko, literaturo, historio de la lingvo kaj movado. Ĉiutage estas unu horo dediĉata al kantado, por ke la partoprenantoj de SET kapablu kontribui al kunvenaj amuzprogramoj en siaj kluboj. En supera kurso oni konatiĝas ankaŭ kun la plej konvenaj instrumetodoj, oni ne forgesas eĉ la fundamentajn pedagogiajn kaj metodologiajn sciojn. Por ĉiuj tendaranoj estas prezentataj ankaŭ kelkaj organizaj lecionoj por ke ili konatiĝu kun la plej sukcesaj labormetodoj de la por- kaj peresperanta laboro en junularaj grupoj. La partoprenantoj povas elekti el kvar kursoj: A-elementa, B-progresiga, C-konversacia kaj D-porinstruista. En ĉiu kurso estas instruata gramatiko kaj historio en adekvata amplekso. Fine de ĉiu tendara etapo okazas la ekzamenoj, kaj ĉiu frekventinto ricevas diplomon kun indiko pri finstudita kurso kaj resuma noto. Al lingva perfektigo de ĉiuj tendaranoj oni klopodas eluzi ankaŭ la tempon post la instruado. Unue oni stimulas ĉiujn tendaranojn paroli nur Esperante. Kun eksterlandaj ĉeestantoj estas organizataj publikaj diskutoj kun tuja interpretado. Ĉe bivakfajroj estas prezentataj programeroj en Esperanto. En Esperanto oni ankaŭ faras ĉiujn gravajn organizajn informojn. Nedisigebla parto de la tendara vivo estas, kompreneble, diversaj amuzaj programoj, sportaj konkursoj, banado en la barajlago. Al la proksimaj vidindaĵoj celas la duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj. Ĉio-ĉi kunela harmonio inter naturo, amika etoso, interesa programo, bonkvalita instruado forte impresas ĉiun ĉeestinton, kiu post la hejmenreveno neniam forgesas la tempon travivitan en SET.

## DDR-Treffen: Anmeldungen noch möglich

**In der Zeit vom 28. — 30. 9. 1984 findet in Dresden das IV. Zentrale Treffen der Esperantisten der DDR statt. Man rechnet mit 200 Teilnehmern, darunter zahlreiche ausländische Esperantisten. Es wird ein vielseitiges Programm, vollständig in Esperanto, geboten. Preis für DDR-Teilnehmer (Übernachtung, Verpflegung, Programm) 115,—, für Ausländer 125,—. Anmeldungen (formlos) sind noch möglich: Esperanto-Verband, 1080 Berlin, Charlottenstraße 60.**

## Oferto de SET

SOMERA ESPERANTO-TENDARO Lanĉov Ĉeĥoslovakio en la tempo de la 1-a de majo ĝis la 30-a junio kaj de la 1-a de septembro ĝis la 30-a de septembro funkcias kiel „Kabana komunumo" kategorio B por via refreŝiĝo. Vi povas en ĝi travivi aŭ unu aŭ du semajnojn, vere en bela kaj trankvila medio ĉe la valbarajo de Vranov.
La prezo por unu kabano MULTI 120 kun 4 litoj kaj kun necesa ekipaĵo kostas 140 Kčs por unu tago.
Esperantistoj kun valida legitimilo ricevos dek-percentan rabaton.
Por dispono estas kuirejeto kun necesa ekipaĵo, gasforno kaj gaskuiriloj.
Memstaraj necesejoj kaj lavejoj estas en la arealo de la komunumo. Varma fluanta akvo je dispono.
Elpruntebla estas sportaj aĵoj, remboatoj, tabloteniso. Ludejo por volejbalo estas ankaŭ je dispono.
En la distanco de 200 m de la komunumo estas banado kaj ankaŭ vendejo. Granda vendejo kaj restoracio troviĝas en la vilaĝo Lanĉov — distanco de 1 km. En restoracio eblas manĝi.
La urboto Vranov estas perpiede en distanco de 3 km, per aŭtomobilo 5 km.
En la komunumo troviĝas aŭtoparkejo.
Proksimume 25 km oni bezonas por atingi la urbon Znojmo.
Pluajn informojn oni povas ricevi ĉe Esperanto-Klubo, TŘEBÍČ, ČSSR.

La adreso: ESPERANTO.
CS — 674 01 TŘEBÍČ
Ĉeĥoslovakio

Interesuloj, kiuj volas travivi semajnon aŭ du semajnojn de la 11-a de aŭgusto la 1-a de septembro 1984 devas aliĝi al turisma oficejo de junularo:

CKM,
Česká strato 11
657 04 B R N O
ČSSR

### Lanĉov 1984

1. 7. 1984 — 14. 7. 1984 unua etapo
15. 7. 1984 — 28. 7. 1984 dua etapo
29. 7. 1984 — 11. 8. 1984 tria etapo

Estimata samidean/in/o!
La Esperanto-Klubo, loka grupo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Třebíč aranĝos la 32-an Someran Esperanto-Tendaron /SET/. Ĝi okazos en tri etapoj en la tradicia loko apud la granda valbaraja lago de Vranov ĉe vilaĝo Lanĉov/prononcu lanĉof/, distrikto de la urbo Znojmo. La instruado de Esperanto okazos en ĉarma romantika regiono ĉiutage krom la dimanĉo de la 8-a ĝis la 12-a horo en kvin divergradaj kursoj nome

A — por komencantoj
B — por progresintoj
C — konversacia
D — por estontaj instruantoj
E — por tradukantoj

Posttagmeze okazos banado, sportado, ekskursoj, vespere tendarfajroj kun kantado kaj simile. La tendaranoj loĝas kvarope en kabanoj. La tendarkotizo, kiu inkluzivas kvar manĝojn tage, estas 1 200 Kčs.
La aliĝo de eksterlandanoj validas post ricevo de antaŭpago de 500 Kčs. Reston vi pagos persone en la tendaro. Post ricevo de via aliĝilo ni informos vin kielmamiere vi sendu antaŭpagon. Aliĝontaj grupoj devas havi akompananton, kiu bone regas Esperanton. Grupoj de komencantoj krom tio devas havi sian kursestron. Al grupoj de infanoj ni proponas partopreni la 1-an etapon.
Gvidanto kiu akompanos 20 personan grupon ricevos 100 % rabaton, gvidanto de 15 persona grupo 75 % rabaton, de 10 persona grupo 50 % rabaton kaj gvidanto de 5 persona grupo 25 % rabaton.
La ekskursoj — unu tuttaga aŭtobuse kaj du duontagaj dum unu etapo ne estas enkalkulitaj en la tendarkotizo. Ilia prezo estas proksimume 80 Kčs.
Ni invitas eksterlandajn samideanojn KUN BONA SCIO DE LA LINGVO kiuj ŝatas tendaran vivon kaj volas perfektiĝi.
Dum la 31 jaroj de SET partoprenis en ĝi gesamideanoj el preskaŭ ĉiuj eŭropaj kaj 4 transmaraj landoj. Ili helpis al ni krei la deziratan internacian lingvan etoson. Por ĉiu etapo ni akceptos nur la unuajn 120 aliĝilojn, tial ni urĝe konsilas al vi aliĝi la plejmalfrue ĝis la 15-a de majo 1984. Post tiu ĉi dato ni akceptos vin, se estos ankoraŭ libera loko. La necesajn informojn rilate la alvenon, restadon kaj vivon en la tendaro ricevos ĉiu aliĝinto kune kun la konfirmo de akcepto.

CS—674 01 T Ř E B Í Č — ČSSR
Esperanto-Klubo, loka grupo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
Ni esperas renkonti ankaŭ vin en nia tendaro.

**Rimarko de la redakcio:** Se vi legas tiujn informojn, vi konstatos, ke ili por la kuranta jaro ne plu estas uzablaj pro la malfrua apero de nia revueto. Tamen ili validas kun similaj datoj por 1985. Do preparu vin.

## La mondo en bildkartoj

La klubo de Interpopola Amikeco „Juneco" de la taŝkenta mezgrada lernejo N34 aŭtune 1985 organizos la ekspozicion „La mondo en bildkartoj, por kiu estas kolektataj ĉiulandaj bildkartoj pri la temoj: vidindajoj, naturo, popolaj kutimoj, naciaj kostumoj, arto, kulturo, muzeoj, junularo, infanoj, sporto, aŭtoj, faŭno, floroj k. a. Estas atendataj ankaŭ esperantlingvaj skizaj rakontoj pri popolaj kutimoj, moroj, naciaj festoj, historio de monumentoj. Krome estas serĉataj landaj flagetoj kaj urbaj blazonoj. Ni petas la tutmondan esperantistaron reeĥi kaj sendi ĉion al la adreso: Vladimir Masalkin, 700093 Taŝkent—93, massiv Junusabad, kvartal 8, dom 13, kv. 28, Uzbekistan, USSR. Ĉiu kontribuonto ricevos respondon kaj bildkartojn pri Uzbekistanaj urboj aŭ alian rekompecon laŭ interkonsento.
Represo de ĉi-anonco estas petata!

## „Bukareŝta Informilo"

Pri aktivadoj de rumanaj esperantistoj informas la titole menciita monata informilo, redaktata de Vochin Marian, Casuta Postala 30—93, 71400 Bucuresti 30, Rumanio. Ĝi entanas multajn informojn, kiuj pruvas la vigliecon de la rumana Esperanto-movado.

## Turismaj aranĝoj dum 1984 kaj konstante ripetiĝontaj dum sekvontaj jaroj

Pro la aperprokrastiĝo de „der esperantist" ni nur represas informojn pri tiuj aranĝoj, al kiuj oni ankoraŭ povus aliĝi por 1984. Krome ni donas indikojn pri la plej gravaj aranĝoj ĉiujare reokazantaj.

### I 1984

Mallongigoj. D — datoj, L — loko, T — temo, OK — organiza komitato, K — korespondadreso, R — rimarkoj

1. **Bulgario**

1.1. **Korusa Esperanto-Renkontiĝo**
D: aŭgusto 21 — 30, L — Pisanica
T: Konkurso de diverslandaj korusoj, turismaj kaj distraj programeroj.
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, P. K. 791, BG—1090 Sofio

1.2. **Internacia Blindula Esperanto-Renkontiĝo (IBER)**
D: septembro 01 — 07, L — Pisanica
OK: adreso ĉe 1.1.

1.3. **Esperantista Renkontiĝo de Go-ludantoj (ERGO)**
D: septembro 01 — 14, L: Pisanica
OK: adreso ĉe 1.1.

1.4. **Foira Internacia Esperanto-Renkontiĝo**
D: septembro 28 — 30, L: Plovdiv-Stambolijski
T: 40jara jubileo de socialisma Bulgario
OK: BEA, Distrikta Estraro, P. K. 184, BG—4000 Plovdiv

1.5. **Esperanto-Kurso por medicinistoj**
D: novembro 11 — 18, L: Pisanica
T: Esperanto-Kursoj, ekskursoj, amuzvesperoj, diskotekoj k. s.
OK: adreso ĉe 1.1.

Informoj pri prezoj ĉe la reprezentanto por la aranĝoj en GDR: Christo Ignatov, 1020 Berlin, PSF 315. Al la reprezentanto oni ankaŭ povas pagi la sumon en markoj de GDR.

2. **ĈSSR**

**Naturamika Esperanto-Libertempado**
D: Konstante, L: Malaltaj Tatroj
K: J. Katreniak, Partizánska 27, ĈS—97646 Valuská
R: Aparte favoraj aliĝ-kondiĉoj por grupoj

3. **Hungario**

**14a Vintra Esperanista Feriado (VEF)**
D.:1984 dec. 28 — 1985 jan. 02, L: Budapeŝto
OK: HEA — Budapeŝta Komitato, Pf. 153, H—1443 Budapeŝto

4. **Pollando**

4.1. **20a Internacia Esperanto-Feriado „Ora Pola Aŭtuno"**
D: septembro 01 — 14, L: Miedzygórze
O: Regiona Konsilio de PEA en Vroclavo
K: Esperantotur, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, Pl—85-094 Bydgoszcz

4.2. **1a Kongreso de polaj esperantistoj-fervojistoj**
D: septembro 15 — 22, L: Tarnowskie Góry
T: varia faka kaj kultura-turisma programo
O: Fervojista Sekcio de PEA,
K: adreso ĉe 4.1.

4.3. **10a Internacia foiro de Esperanto-turismo**
D: oktobro 21 — 28, L: Bydgoszcz-Varsovio
O: Esperantotur, Turisma Servo de Monda Turismo
K: Esperantotur-Pollando, adreso ĉe 4.1.

**Atentigo:** Pri la prezoj, aliĝkondiĉoj kaj precizaj programoj petu informojn ĉe O, OK aŭ K.

5. **Rumanio**

**Esperanto-aranĝoj por kuracado**
L: Timisoara-Buzias, D: kiam ajn 1984
T: Kuracado de reŭmatologiaj doloroj, Esperanto-rekontiĝoj
OK: Oficiul Judetean de Turism, P. Craiului 3, Timisoara.

### II. Ĉiujare ripetiĝantaj tradiciaj Esperanto-aranĝoj aparte rekomendindaj

6. **Bulgario**

6.1. **La Internaciaj Esperanto-Kursoj en Pisanica**
D: de januaro ĝis decembro,
L: Pisanica ĉe Smoljan en Rodopi-montaro,
T: 14-tagaj Esperanto-kursoj (ĉiun antaŭtagmezon, 4 lernohoroj), interkona kaj adiaŭa vesparoj, prelegoj kun diapozitivoj, turisma programo kun tri kursoj k. t. p.
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG—1090 Sofio.
Informojn por GDR-anoj donas: Christo Ignatvo, 1020 Berlin, PSF 315, Krome ĉe OK vi ricevas kompletan programkajeron pri la diversaj aranĝoj okazontaj en Bulgario, aparte en Pisanica, Varna kaj aliaj lokoj ĉe Nigra Maro.

6.2. **Somera Esperanto-Universitato**
D: verŝajne dum julio, 5 tagoj,
L: Veliko Târnovo
K: BEA, Bul. Hristo Botev 97, BG—1303 Sofio
T: popularsciencaj prelegoj pri esperantaj kaj neesperantaj temoj de bulgaraj kaj eksterlandaj eminentaj sciencistoj.
R: Tuj post la aranĝo eblas kelktaga restado en Pisanica.

7. **ĈSSR**

7.1. **Junularaj Esperanto-skitagoj**
D: Kutime dum januaro, 8 tagoj,
L: Špindleruv Mlyn
OK: Junulara Sekcio de ĈEA, Jilská 10, ĈS—11000 Prago.

7.2. **Internacia esperantista pac-renkontiĝo**
D: marto, 3 tagoj, L: Pardubice (Orienta Bohemio)
T: Problemoj de pacbatalo, ekskursoj, kulturprogramo
K: Ĉeha Esperanto-Asocio, Jilská 10, ĈS—11000 Pargo
R: Eblas ankaŭ dutaga aldona restado en Prago.

7.3. **Somera Esperanto-Tendaro (SET)**
D: julio, aŭgusto, 3-foje po 14 tagoj,
L: Lanĉov, Suda Moravio
ĈEA, vidu 7.2. aŭ Esperanto-Klubo, ĈS 67401 Třebič
R: Tradicia aranĝo kun diversnivelaj kursoj kaj ekskursoj, aparte por gejunuloj kaj turistemuloj.

7.4. **Somera Esperanto-Lernejo (SELKO)**
D: julio, 2 semajnoj,
L: Jasov, distrikto Košice
T: lingvokursoj, diversnivelaj, ekskursoj
K: Slovaka Esperanto-Asocio, Kleriga Centro, ĈS 05801 Poprad, Sobotské nam. 6

7.5. **Junulare Esperanto-Lernejo (JEL)**
D: julio, 2 semajnoj,
L: Jasov: distrikto Košice
T: lingvokursoj por gejunuloj, ekskursoj,
K: adreso ĉe 7.2.

7.6. **Turisma semajno (TESE)**
D: julio, 1 semajno,
L: Spiešská Nová Ves, Kampadejo Tatran (Slovaka Paradizo),
T: ekskursoj diversgradaj
K: Peter Pavůk, Jilemnického 17/9, ĈS 05201 Spišská Nová Ves

7.7. **Turismaj tagoj (Tuta)**
D: aŭgusto, 1 semajno, L: Žilina
T: turisma programo diversgrada
K: Ladislav Hanzel, Trieda Obrancov mieru 25, CS—01001 Žilina

8. **Hungario**

8.1. **Junulara Esperanto-Renkontiĝo (JER)**
D: aprilo, 3 tagoj, L: diversoj urboj
T: junulara Programo por Hungara Esperanto-Junularo kun eksterlandaj partoprenantoj
K: Hungara Esperanto-Asocio, Pf. 193, H—1368 Budapest

8.2. **Somera Esperanto-Universitato (SEU)**
D: junio aŭ julio, 2 semajnoj, L: Gyula
T: diverstemaj popularsciencaj prelegoj, kultura programo, lingvokursoj
OK: Sciencpopulariga Asocio (TIT), 48as u. 1, H—5601 Gyula
R: Tradicia aranĝo, 1984 jam 22a sesio, tre rekomendinda.

8.3. **Pionira Internacia Tendaro (PIT)**
D: julio, 2 semajnoj,
L: Zánka ĉe Balatono
T: devigaj Esperanto-kursoj, aliaj por-infanaj programeroj
OK: HEA, Teritoria Komitato, Pf. 2, H—7601 Pécs

8.4. **Esperanto-lernejo por bazlernejanoj (ELB) kaj Esperanto-lernejo por plenkreskuloj (ELP)**
D: julio, 1 semajno,
L: Kiliántelep ĉe Balatono
OK: „Express" Esperanto-Fako, Szabadság tér 16, Budapeŝto
R: Du paralelaj Esperanto-aranĝoj kun diversgradaj kursoj kaj kun varia kultura-turisma kromprogramo.

8.5. **Internacia Renkontiĝo Naturamika (IREN)**
D: julio, 10 tagoj,
L: Abaliget apud Pécs
T: Esperanto-kursoj, gimnastiko, marŝadoj, busekskursoj, tendarfajroj k. t. p.
OK: adreso ĉe 7.3.

8.6. **Somera Esperanto-lernejo en Eger (SELE)**
D: aŭgusto, 2 semajnoj, L: Eger
T: diversgradaj Esperanto-kursoj, varia kultura-turisma programo
OK: HEA Departementa Komitato, Pf. 105, H—3301 Eger

8.7. **Someraj Esperanto-Kursoj en lingvo-laboratorio (SEKEL)**
D: aŭgusto, 10 tagoj, L: Szombathely
T: diversgradaj Esperanto-kursoj, amuzvesperoj, ekskursoj
OK: HEA-Departementa Komitato, Pf. 45, H—9701 Szombathely

8.8. **Vintra Esperantista Feriado (VEF)**
D: jarŝanĝe, 28a decembro,
L: Budapeŝto ĝis 2a januaro
T: varia kultura programo
OK: HEA — Budapeŝta Komitato, Pf. 153, H—1443 Budapeŝto

---

## NOVA ESPERANTO-KLUBO EN UZBEKISTANO

Komence de januaro 1984 en la urbo Urgenĉ estis fondita Esperanto-klubo ĉe la fervojstacia oficejo. Aktivuloj de la nova esperanto-kolektivo deziras starigi leterkontaktojn kun geesperantistoj de la tuta mondo. Viajn leterojn sendu al la adreso:

ESPERANTO-KLUBO „ESPERO",
Ĥasanov Rozumbaj,
Do vostrebovanija,
740001 Urgenĉ—1,
Uzbekistan, USSR.

Respondo estas garantiata.

## Letervespero en Vilnius

Fine de novembro Vilnius-a junulara E-klubo „Juneco" organizos letervesperon „Esperanto por mondpaco kaj amikeco". Poŝtkartoj bonvolu direkti laŭ adreso: E-klubo „Juneco", P. O. Box 61, 232 000 Vilnius—C, Litovio. Ĉiu sendinto ricevos respondon.

## Ekspozicio en Rumanio

Dum ses semajnoj (marto/aprilo 1984) daŭris ampleksa ekspozicio pri Esperanto en la moderna halo de la universitato de Timišoara/Rumanio kaj vekis atentindan interesiĝon inter studentoj kaj docentoj.
Dum aprilo ankaŭ aperis la tria eldono de „Gramatika kurso de Esperanto", verkita de prof. I. F. Bociort kaj M. L. Dobre.

Laŭ Liviu Podariu

# El la vivo de GDREA

## Impresriĉa semajno en Ohrdruf/ Turingia arbaro

Centra Estraro kune kun la Distrikta Estraro Erfurt de Esperanto-Asocio de GDR invitis gejunulojn al intensa kurso de Esperanto. La kurso okazis de la 12-a ĝis la 19-a de majo 1984 en feriejo de Ohrdruf, en bela ĉirkaŭaĵo de la mezmontara Turingia arbaro.

Venis 32 partoprenintoj. La domoj troviĝis same kiel apartaj manĝejo, klubejo kaj duŝejoj en vasta tereno kun fruktarboj kaj eĉ banejo. Sur granda herbejo oni povis ludi tablotenison kaj volanludon.

Krom la 28 GDR-anoj alvojaĝis 4 slovakaj geamikoj. Kaŭze de tio oni povis senti spireton de internacia atmosfero, kiu, kvazaŭ kiel la salo en la supo, estis kontribuajo al internacia popola amikeco.

La lingvokapabloj de la alvojaĝintoj estis grandskale inter la du ekstremoj de vera nescianta komencanto kaj lerta parolanto. Majstris tiun grandan amplekson la sperta slovaka instruisto Stano Marĉek per interesa solvo. Dum 30 horoj li instruis laŭ la rekta metodo tri grupojn da partoprenantoj. Komencantoj sukcese lernis Esperanton, progresintoj multflanke praktikis la internacian lingvon kaj la meza grupo lernis paroli. S-ro Marĉek gvidis la instruadon en varia kaj vigla maniero, parte liberaere. Li instruis kelkajn kantojn kaj mem lerte ludis gitaron. Abunde kiel la aĝoj estis ankaŭ la atendoj, imagoj kaj esperoj, kun kiuj estis alvojaĝintaj la junaj geesperantistoj. Sed ĉiuj estis kunligitaj per la sama intereso, la entuziasmo por Esperanto.

Malgraŭ la malfavora vetero oni aranĝis abundan kadran programon. Interkona vespero okazis sabate, la 12-an de majo

La migradon al la teknika muzeo Tobiashammer gvidis sekvadimanĉe Werner Habicht. Malgraŭ tre pluva vetero ekmarŝis 20 partoprenantoj, sed atingis nur naŭ la celon. Reveninte oni aŭskultis bonhumore lumbildprelegon pri la ĉirkaŭaĵo de Ohrdruf, kiun prezentis Werner Habicht, la honora prezidanto de la distrikta estraro Erfurt de GDREA.

Lunde oni aranĝis posttagmeze post la instruado rostadon de kolbasoj — turingia specialaĵo — kaj vespere diskotekan dancadon, kiu ripetiĝis malgrandamplekse ankoraŭ kelkfoje dumsemajne. Merkredon oni vizitis rajdejon el la najbara loĝloko Crawinkel. Jaŭde oni faris busekskurson al Ohre-valbaraĵo, kaj vespere ĉiuj kantante sidis ĉirkaŭ tendara fajro kaj rostis terpomojn. Prezentis kaj instruis Stano Marĉek kaj lia ĉarma edzino, kiamaniere oni povas trairi nudpiede la ardaĵon de la tendara fajro.

Malgraŭ riĉa programo restis ankoraŭ sufiĉe da tempo dum la semajno por promenadi aŭ viziti la urbon Ohrdruf, por komuna aŭskultado de E-sonbendoj kaj por informa interparolado pri la Esperanto-movado, kiun gvidis F. Krake, la oficiala peranto de la distrikta estraro.

Dum malgranda vizito vendrede pri la sukceso de la kurso konvinkiĝis la distriktestro de la distrikta estraro Erfurt de GDREA, s-ro Hans-Jürg Kelpin.

Vendrede finiĝis vere impresriĉa semajno per adiaŭa vespero. Per vortoj kaj donacaĵoj la partoprenintoj dankis la Stano Marĉek kaj al la tre helpema hejmastra geedza paro. Komuna kantado kondukis la vesperon al diskoteka dancado kaj la kurson al la fino.

F. Krake

## 8a plenkunsido de la Centra Estraro de GDREA

La Centra Estraro de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA) okazigis sian 8an plenkunsidon la 20an kaj 21an de januaro 1984 en Gera. Laŭ la tagordo oni traktis ĉefajn internaciajn eventojn tirante el ili konkludojn por la agado de GDREA. Tiu programero intime kunligiĝis al la larĝa debato pri eblecoj pli forte utiligi Esperanton por sociutilaj celoj. Oni krome traktis la agadon sur distrikta kaj loka niveloj, aŭskultis kelkajn raportojn kaj aktualajn informojn el la internacia kaj nacia Esperanto-movado. La Centra Estraro de GDREA kooptis kiel novan membron Achim Zettier el Pernzlau. Pro transpreno de la funkcion de prezidanto de la Distrikta Estraro de GDREA en Halle Peter Bartos el Halle fariĝis membro de la Centra Estraro. La iama prezidanto Siegfried Linke restas membro de la prezidio de GDREA.

## 9-a Plenkunsido de CE de GDREA

La antikva kaj samtempe novkonstruita urbo Neubrandenburg en la nordo de GDR gastigis la membrojn de la Centra Estraro de GDREA por ilia 9-a plenkunsido 25./26. 5. 84. Tiu traktis aktualajn problemojn de la internacia politika situacio kun konkludoj por la agado de GDREA (Hans Heinel) kaj ĉefajn problemojn de la kreo de esperanta ekzamena sistemo por kursgvidantoj en GDR (d-ro Till Dahlenburg), diskutis proponon de Joachim Schulze por unueca grafika prezento de esperantaĵoj de GDREA kaj aŭskultis raportojn pri la agado de la distriktoj organizaĵoj de GDREA en Neubrandenburg, Frankfurt/O. kaj Leipzig. La plenkunsido krome aŭskultis diversajn raportojn pri internaciaj kaj naciaj aranĝoj.

# El la vivo de GDREA

## Seminario por Esperanto-aktivuloj en Lychen

Inter la 20a ĝis 25a de novembro 1983 okazis seminario por E-aktivuloj fare de nia centra estraro. Partoprenis 22 aktivaj esperantistoj el la tuta respubliko. La seminario estis gvidata de Achim Zettier el Prenzlau. La programo estis tre multflanke kaj interesa. Inter alie parolis d-ro Blanke pri sciencaj temoj, s-ano Zettier pri problemoj de Esperanto-instruado, s-ano Werner Pfennig pri varbado kaj s-ino Wera Dehler ekzercis la ĝustan prononcon kun la partoprenintoj. Ŝi ankaŭ prelegis pri fakvortoj en Esperanto. La vesperoj ofte enhavis diskutojn diverstemajn. Tre sukcesa ankaŭ estis diskutadoj inter la partoprenintoj kaj la membroj de centra estraro, speciale pri temoj de E-instruado kaj publikaj rilatoj.

Dum la seminario oni parte parolis germane, parte en Esperanto. Nun estas necese, uzi apliki la lernitaĵojn en la praktiko.

Lothar Körner

## Jam la 8-a

De 21a ĝis 23a de oktobro 1983 la esperantistoj de Neubrandenburg okazigis jam 8-an junularan Esperanto-konferencon de sia distrikto. Partoprenis 32 gejunuloj, inter ili gastoj el la pola partnera urbo Koszalin. Rimarkindes en la programo prelego de Achim Zettier pri Martin Luther.

## Technische Gründe für einige Ausfälle 1984

In diesem Jahr mußten aus technischen Gründen einige Esperanto-Veranstaltungen ausfallen:

— IFER (März) in Leipzig wegen eines geplatzten Heizkessels,
— Treffen der Mediziner-Esperantisten in Potsdam (April) sowie das 2. Basis-Seminar in Lychen (April) wegen zu wenig Anmel_ungen,
— Intensivkurs Antonshöhe (April) wegen eines Wasserrohrbruches,
— Intensivkurs Etterwinden (Mai) wegen plötzlicher Kündigung des Vertrages durch den Objektträger auf Grund andere zentral gesteuerter Belegung durch den FDGB.

Esperanto-Verband, Zentralvorstand

## Prelegoj antaŭ lingvistoj

La 23an de marto 1984 d-ro Detlev Blanke prelegis antaŭ 50 lingvosciencistoj de la Karl-Marx-Universitato en Leipzig pri „problemoj de interlingvistiko".

## VII-a ITREE en Johanngeorgenstadt

Jam la 7an fojon okazis la Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro, ĉifoje de la 10a ĝis 14a de majo 1984 en Johanngeorgenstadt, en GDR. Ĝi estis dediĉita al la 35a datreveno de la fondiĝo de Germana Demokratia Respubliko. Partoprenis pli ol 80 esperantistoj, inter ili eksterlandanoj el ĈSSR, Hungario, Pollando kaj eĉ unu el Vjetnamio. Ke ankaŭ tiu renkontiĝo fariĝis travivaĵo oni unuavice dankas al Rudolf Eichler, estro de la Distrikta Estraro de GDREA Schwarzenberg, kiu pro malsano ne povis partopreni, kaj al la estro de la grupo en Karlovy Vary, Jaroslav Klement.

## Aktiviga renkontiĝo

Bona formo de aktiviga estrarkunsido estas intensiva aranĝo, miksaĵo el estrarkunsido kaj kleriga kurso, kiun aplikis la anoj de la Distrikta Estraro de GDREA Dresden, la 9an ĝis 11an de januaro 1984 en la Kulturakademio Rammenau. La 22 partoprenintoj traktis la plenumendajn laborplanerojn kaj krome aŭskultis plelegojn i. a. pri MEM, pri metodiko de Esperantoinstruado, pri la 68a Universala Kongreso.

## Dresdenanoj en Ostrava

Havante jam dum 10 jaroj amikeckontrakton kun la Esperanto-grupo en Ostrava, la grupo de GDREA en Dresden sendis delegitaron al sia ĝemela grupo la 13an de aprilo 1984 al Ostrava. Krom spertinterŝanĝo pri efikaj metodoj en la peresperanta porpaca batalo, ili vizitis kulturajn monumentojn en la ĉeha distrikto kaj metis florkronon al la monumento en la vilaĝo Hrabine, kie dum aprilo 1945 mortis en kontraŭfaŝismaj bataloj preskaŭ 20 000 sovetaj kaj mil ĉeĥoslovakaj armeanoj.

(Laŭ J. Berndt)

## Infanoj vojaĝis

Bone funkcias la interŝanĝo de esperantistaj infanoj inter Stralsund kaj Sobrance.

De 15a ĝis 23a de julio 1983 15 infanoj de la Esperanto-grupo el Stralsund vojaĝis al la Altaj Tatroj. Akompanis ilin 4 gepatroj kaj krome de la grupa estraro H. J. Borgwardt kaj G. Ebert. Ili prenis hejmen multajn neforgeseblajn rememorojn kaj jam 4 semajnojn post, nome de 25a ĝis 29a de aŭgusto al Stralsung venis 11 infanoj kaj du plenkreskuloj de la slovaka Esperanto-grupo el Sobrance. La Pionirdomo de Stralsund subtenis finance. La infanoj el Stralsund akompanis kaj ĉiĉeronis siajn slovakajn geamikojn. Jen bona, konkreta kaj laŭdinda aktiveco de la grupo en Stralsund.

(laŭ Stralsundaj Frekvencoj 5/1983)

## Prononca sonbendo

La sonbenda servo de GDREA (inĝ. Klaus-Dieter Dungert, 3027 Magdeburg, Albin-Brandes-Str. 3) ofertas prononcan sonbendon al la lernolibro de Till Dahlenburg/Peter Liebig. La sonbendon pretigis Sabine Fiedler kaj d-ro Erich-Dieter Krause. Ĝi certe estos bonvena helpilo por kursoj kaj aŭtodidaktoj. Ricevebla laŭ la konataj kondiĉoj de la sonbenda servo (komparu „der esperantist" n-ro 112, 2/1982) ĉe Klaus-Dieter Dungert.

## Distrikta renkontiĝo Frankfurt/Oder

La 19an kaj 20an de novembro 1983 en Eggersdorf apud Strausberg okazis nia ĉijara distrikta renkontiĝo. Partoprenis 49 personoj, inter ili ankaŭ kiel reprezentantoj de la ĝemelaj urboj Katja Marinova kaj Snejinka Angelova el Vraca, Bulgario, kaj Wladyslaw Klimek kaj Andreo Banaŝ el Gorzow, Pollando. Krom tiuj ankaŭ ĉeestis du leteramikoj el Šumperk, Ĉeĥoslovakio. Tre ĝojiga estis ankaŭ la grandnombra partopreno de gejunuloj, speciale el la subdistrikto Wriezen. Dum la malfermo partoprenis krome la subdistrikta sekretario de la KL Strausberg, k-do Krüger, kaj la klubsekretariino, s-ino Schmiede.

Post la malfermo kaj salutvortoj de la reprezentantoj de niaj ĝemelaj urboj nia distrikta prezidantino Bärbel Kulisch bilancis la agadon de niaj esperantistoj dum la pasinta jaro kaj povis konstati, ke la E-agado travivis bonan evoluon sur multaj kampoj. Sed ŝi ankaŭ kritikis kelkajn malfortaĵojn kaj esprimis la esperon, ke ankaŭ tio ŝanĝiĝu dum la venonta tempo. Dum la renkontiĝo oni montris lumbildojn pri la UK en Budapeŝto kaj la junulara kongreso en Debrecen. Okazis krome komune amuzvespero. Intereson vekis la sekvan tagon la ekspozicio pri „artisma vitroformado" en la KL-klubejo de Strausberg, kiun la artisto mem partoprenis kaj povis respondi al la demandoj de partoprenintoj.

Ni ne volas forgesi la multan laboron necesan por la bona sukceso de nia renkontiĝo kaj aparte danki al la prezidanto de la subdistrikta estraro Strausberg, s-ano Lothar Müller, al lia diligenta helpintino, s-ino Ruth Kiel, kaj kompreneble ankaŭ al nia distrikta „ĉefesperantistino" Bärbel Kulisch. (KL = Kulturligo) Lothar Körner, Schwedt

## Informilo profesnivela el Leipzig

La distriktaj organizajoj de GDREA Leipzig kaj Halle eldonas jam la 10an jaron sian „Komunan Esperanto-Informilon", kiujn redaktis unue Jürgen Hamann, poste Michael Behr kaj ekde n-ro 54 (4/1984) Sabine Schulze-Hingst kaj Joachim Schulze el Leipzig. Per tiu numero la informilo ŝanĝis kaj titolon kaj aspekton. Ĝi nun nomiĝas „Esperanto-Informilo" kaj estas produktata fotoprese. La menciita numero entenas i. a. intervjuon kun d-ro Krause, aŭtoro de la vortaro Germana/Esperanto, informojn, enigmojn, anekdotojn kaj eĉ kuir-recepton. La informilo ankaŭ estas internacie abonebla. Informojn ĉe Helga Beau, 7010 Leipzig, Jacobstr. 9.

## Magiisto

La membro de GDREA Helmut Rieche el Bernburg ne nur estas aktiva esperantisto sed ankaŭ flegas la hobion de magio. Ofte pri talentoj de unuopaj membroj oni nur ekscias el eksterlando. Mihály Szekeres el la hungara urbo Makó informis nian redakcion pri tre sukcesa „magia programo", kiun Helmut Rieche prezentis lastjare en Makó antaŭ pli ol cent infanoj kaj en la urba banejo por ripozantoj, pri kio ankaŭ raportis la departementa gazeto de Csongrád (30. 7. 1983). Lia hungara amiko tradukis esperanten. Tre originala peresperanta kultura ago.

## 10-a semajnfina seminario

Jam la 10an fojon, de 3. — 5. 2. 1984 la Distrikta Estraro de GDREA en Neubrandenburg okazigis semajnfinan intensivan seminarion. La 10a aparte servis al trejnado de bona prononcado. Partoprenis 53 esperantistoj. Lektoris Werner Pfennig, Brunhilde Stief, Carola Lehr kaj Elke Valtin.

## Solena Zamenhof-kunveno en Zwickau

La 8an de decembro 1983 la Esperanto-grupo en Zwickau okazigis renkontiĝon de esperanto-veteranoj el la distrikto Karl-Marx-Stadt (subdistrikto Ercmontaro-Vogtlando) okaze de la naskiĝtago de Zamenhof. La renkontejo estis la Zwickaua klubo en la domo de Kulturligo. Post la salutvortoj al la 24 ĉeestantoj, samideanino Knadel prezentis la versaĵon „La vojo" de Zamenhof. Ampleksan prelegon pri la vivo, pri ideoj kaj celoj de doktoro Zamenhof donis Paul Thomas. Poste eksonis belaj esperantlingvaj kantoj de sonbendoj, kaj oni deklamis la versaĵon „La blua floro" de Erich Würker. La historion de la Laborista Esperanto-movado en Zwickau prezentis Rudi Weiß.

Lumbildprelegon pri Varsovio kaj doktoro Zamenhof donis Erich Würker. Diapozitivojn pri la lastaj Esperanto-mondkongresoj montris Paul Thomas.

**Noebes Arthur: BLEA kaj IPE. Historio de la Brita Laborista Esperanto-Asocio kaj Internacio de Proleta Esperantistaro. Rochester 1983, 22 p.**

Havebla ĉe Penelope Maybin, 48 Maidstone Road, Rochester, Kent ME1 1RJ, Grandbritio aŭ ĉe GDREA kontraŭ 5 markoj.

Jen interesaj rememoroj de brita laborista esperantisto pri gravaj ĉapitroj kaj faktoj el la internacia kaj brita laborista Esperanto-movado. Noebes prezentas rememorojn, do ne sciencan analizon. Laŭ mia impreso liaj rememoroj, kompletigitaj per diversaj fotoj, estas ĝustaj kaj laŭas al la ĝis nun publikigitaj fonto-studoj de marksistoj, i. a. prezentitaj en „Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado" (Budapest 1978). Aparte li elstarigas la kontribuon de la britaj laboristaj esperantistoj (orientitaj marksisme) al IPE. Gravas liaj memoroj pri la historio de IPE dum la 30aj jaroj kaj pri ties dissolvo. Bedaŭrinde mankas fontindikoj. Tial la broŝuro estas bone uzebla nur lige al fontmaterialoj. La broŝuro instigu aliajn veteranojn de la laborista Esperanto-movado same publikigi siajn rememorojn aldonante, se ekzistas, verigajn dokumentojn. D.B.

# LEGU KAJ LERNU

**n-ro 1**

## (Redaktas: Dieter Berndt, 1020 Berlin, Berolinastraße 2)

**Post dujara paŭzo vi nun denove trovos sur la paĝoj de „der esperantist" la rubrikon „Legu kaj lernu". Ĝi estas destinita ĉefe por tiuj, kiuj havas komencajn sciojn pri la lingvo kaj ŝatas lerni kaj legi ion sen multe serĉi en la vortaroj. Mi prezentos sur tiu ĉi paĝo diversajn facilajn tekstojn. Por helpi al vi, mi tradukos la plej malfacilajn vortojn kaj atentigos ankaŭ pri gramatikaj aferoj. Samtempe mi volas instigi vin al lernado kaj kunlaborado. Tial vi trovos en ĉiu numero ankaŭ iun taskon, kiun vi povas ellabori kaj sendi al mi. Mi ĝojus, se multaj tion farus. Kompreneble, ke kritikoj kaj rimarkoj pri tiu paĝo estas ĉiam bonvenaj.**

Dieter Berndt

### Cirko

Estas ĉiam eksterordinara evento (Ereignis), kiam al iu urbo aŭ urbeto venas cirko. Alveturas la cirkaj loĝveturiloj, poste oni konstruas la grandan cirko-tendon kaj vespere vi jam povas rigardi la programon. La plej diversajn artistojn vi povas admiri: ŝnur-dancistinon kaj baskul-saltistojn (baskulo = Wippe), aer-akrobatojn aŭ trapezistojn, certe ne mankos klaŭnoj kun komikaj programeroj. Estas tie jonglistoj kaj ponard-ĵetistoj (Messerwerfer; ponardo = Dolch). En cirko neniam mankas bestoj. Ĉefe ĉevaloj apartenas al la cirko. Rigardu la rajdakrobatojn kaj rajdsaltistojn, sed ankaŭ dresistojn de cirko-ĉevaloj kaj ankaŭ dresistojn de aliaj, pli danĝeraj bestoj. Tio okazas en la rabobesta kaĝo, kie oni plej ofte prezentas leonojn, tigrojn, ursojn aŭ aliajn bestojn.

Mi volas rakonti al vi pri imitisto. Li asertis (behaupten) al la publiko, ke li povas imiti la voĉon de ĉiu ajn besto. Li jam blekis kiel ŝafo, bojis kiel hundo, miaŭis kiel kato, gruntis kiel porko, kvakis kiel rano, pepis kiel pasero (Spatz) ktp. (ktp = kaj tiel plu = und so weiter). Li petis, ke la aŭdantoj donu al li pluajn taskojn. Unu momenton ĉiuj restas silentaj. Poste oni aŭdas bonhumoran basan voĉon: Nu, do, kriu kiel olesardino. Kaj tio ŝajnis nesolvebla tasko.

Atentu! Ne intermiksu jenajn tri vortojn, kiuj en Esperanto estas similaj: cirko = Zirkus; cirklo = Kreis, Kreislinie; cirkelo = Zirkel (Gerät).

**Tasko** — Jen vi trovas 12 verbojn. Temas pri voĉoj de bestoj. Vi devas diveni, kiuj bestoj: zumas, klakas, henas, trumpetas, grakas, rukulas, krias, kantas, ĉirpas, siblas, gakas, klukas.
Mi atendas viajn leterojn ĝis du monatoj post apero de tiu ĉi numero. Skribu multnombre!

Dieter Berndt

---

### Recenzo

**La Jaro 1984. Praktika poŝkalendaro de MONATO. Red. S. Maul. TK/Stafeto. Brasschaat. 1983. 160 pĝ.**

„Kalendaro" estas tre modesta nomo por ĉi tiu eldonaĵo, kiun de pluraj jaroj kompilas la kunlaborantoj de la internacia magazino MONATO. El la 160 paĝoj nur la unuaj 63 uzeblaj kiel gvidlibro tra la mondo. Mondmapo kun diversaj aldonaj informoj, kompleta landlisto, trafikŝildoj, unua helpo, manĝaj-informoj kompletigas tiun treege utilan libron. Menciidas, ke ĝi ne estas esperantisma (movada), sed internacia en pozitiva senco sen speciala emfazo de unu aŭ alia mondparto. Malĝustaj estas kelkaj trafikŝildoj el GDR, kiujn oni jam antaŭ pluraj jaroj internaciigis.

Michael Lennartz

# KORESPONDDEZIROJ

**Ni publikigos nur tajpitajn koresponddezirojn!**

## Bulgario

Dramaturgo, 23j., dez. kor. pri teatro, literaturo, arto k. vojaĝoj, kol. ekslibrisojn: Ljubomir Trifonĉovski, str. Al. Stambolijski 17, ap. 11, **3000 Vraca**

Lernantino, 16j., dez. kor. kun germanaj gesamideanoj, kol. bk, pm: Ani Metodieva, ul „Car Samuil" 78, **1000 Sofio**

Stefka Popova, Balvanska Citka 6, **5000 W. Tirnovo,** (22j). dez. kor. kun junaj esperantistoj tutmonde p. ĉ. t.

Instruistino, 26j., dez. kor.: Marija Petkova Slaveva, **Šumen,** str. „Iskra" 22.

Krupiero, 27j., dez. kor. p. ĉ. t.: Laĉezar Josifov Georgiev, poste restante, **1000 Sofio**

Kiril Hlebarov, **2850 Petrič,** str. G. Delčev 8, dez. kor. tutmonde, kol. esperantaĵojn.

20 komencantoj dez. kor. tutmonde: BNB-Esperanto-grupo, **3000 Vraca,** str. Lukašov 2

Veselin Gančev Minčev, **5000 Veliko Tarnovo,** str. „Silvestar" 8, (16j.) dez. kor. kun germanaj geesperantistoj

Gekursanoj el urbo **Šumen** dez. kor.:

— Anton Vasilev Bojadĵiev, ul. „Aprilsko vaŝtanie" 39 (36j.)
— Ruja Nedeva Kostova, ul. Vladajsko vaŝtanie" 18, ap. 9, vh. 4 (25j.)
— Valentina Dimitrova Petrova, ul. „Komsomolska" 64a (22j.)
— Nina Kraŝteva Hristova, bul. „Gagarin" 76, vh. 2, ap. 33, maŝinĝenierino, 33j.
— Donka Stojanova Ivanova, ul. „Alen mak" 46
— Sergej Ivanov, pl. „Oborište" 9 (30j.)

Jordanka Cvetanova Jordanova, **3400 Mihajlovgrado,** str. „Banska Bistrica" 9, bl. Ŝtastie" A, ap. 6, (18j.) dez. kor. kun geesperantistoj el GDR.

Georgi Ivanov Georgiev, **3320 Kozloduj,** bl. 24, ap. 26, (33j.) dez. kor. tutmonde pri turismo, fotografado, kol. pm, bk, diapozitivojn, insignojn

Galia Kirilova Šarkova, **1373 Sofio,** str. Suhodolska 12, d. 5 TNSP (17j.) dez. kor. kun samaĝaj geesperantistoj

## ČSSR

33j. invalida esperantistino dez. kor. tutmonde kun nefumantinoj k. abstinulinoj: Nadĕžda Šzočková, Mirová 352, **542 01 Žaclèř**

Ing Miloš Vlček, nám. Svornasti 5, **616 00 Brno 16,** (56j.) dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, esperantaĵojn

E-klubo en Plzen dez. kor. anoj de E-klubo en GDR, bv. skribi al: Emil Česák, Skalni 22, **312 11 Plzen**

## GDR

Komencantino, 15j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Cornelia Graml, **Siemerode,** Mitteldofstr. 47

Junulo, 18j., dez. kor. pri vojaĝoj k. kampado kun geesp. el soc. landoj: Rainer Birkholz, **2600 Güstrow,** Leninring 1

Britta Grüneberg, **1631 Glienick,** Zossener Str. Str. 15, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

Henrick Marschner, **8703 Bernstadt,** Kirchgasse 6 (32j.), komencanto, dez. kor. tutmonde pri fotografado, filatelo

Komencantinoj, 14j., dez. kor., kol. bk:

— Annette Grunert, **4450 Gräfenhainichen,** Str. d. Jugend 5
— Kerstin Schmidt, **4450 Gräfenhainichen,** Adam-Wage-Str. 25
— Kolektas pripolicajn anekdotojn: **D-ro** Giso Brosche, **7981 Rückersdorf.** Helpu mian kolektadon!

## Hungario

17jara lernanto en Geologia Faklernejo dez. kor. kun samaĝulino p. ĉ. t.: Gábor Fekeŝhazy, **4400 Nyisegyhaza,** Mungadi ut. 102

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16